# HUNGARA VIVO

2
1981
13.–Ft

# Valoraj artobjektoj

# porcelano de bona marko

# stilmebloj

# Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

BÁV

## VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj. 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért

Konsumturist



HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest,
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193, H–1368
Aperas dumonate
XXIa jaro, 1981 n-ro 2
(96)

ENHAVO

*László,* I.: Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Béla Bartók 42
„Bartók-jaro" en Hungario 44
La internacia junulara kunlaboro kaj la lingva komunikado (intervjuoj) 45
Bilanco de kvin jaroj 49
D-ro *Corsetti,* R.: Esperanto en la „tria mondo" 50
*Ragnarsson,* B.: Pri la Esperanta kulturo 52
*László,* I.: Regionoj de Hungario – Departemento Hajdú-Bihar 54
*Gereblyés,* L.: Konfeso al Hungario (I. *Szabó*) 55
*Torda,* I.: Jarcentoj de la hungara literaturo 12. (P.A.*Rados*) 56
*Gergely,* M.: Vladimir Szabó 59
*Farkas-Tatár,* É.: Panoramo 60
*Fenyvesi,* E.: Revuo de revuoj 63
D-ro *László,* F.: Riveroj ne konas landlimojn (E. *Fenyvesi*) 64
*Végh,* A.: Unutaga feliĉo (*VHZS*) 71
*Auld,* W.: „Marjorie – energio nerva" 73
*Boulton,* M.: Marborda ŝtono, Averto al tiranoj, Rimletero, Dekdu piedetoj (Fragmento) 75
Gaja paĝo 77
Recenzo *(U. Lins)* 78
*Mihalkov,* G.: Ekzameno sen risko 79
Krucenigmo 79
Leterkesto, Korespondi deziras 80

Kovrilo: „Antikvaĵ-butiko" – pentraĵo de Vladimir *Szabó.* Foto: Béla *Somhegyi.*

# Du vicprezidantoj plus unu prezidanto...

ĉio estas, d-ro Renato *Corsetti* kaj Baldur *Ragnarsson,* vicprezidantoj de UEA, kaj William *Auld,* prezidanto de la Akademio de Esperanto honoras tiun ĉi numeron per siaj kontribuaĵoj. D-ro Corsetti informas nin pri la ŝancoj kaj jamaj atingaĵoj de Esperanto en la «tria mondo», dum Baldur Ragnarsson, kiu en la Estraro de UEA respondecas pri kulturo, regalas nin per ideoj interesaj kaj plupensindaj pri la Esperanta kulturo. Li invitas niajn legantojn sendi sian opinion ĉu al nia redakcio, ĉu rekte al li mem; ni ne dubas, ke la tezoj vekos la diskutemon en multaj esperantistoj. William Auld, kiu feliĉe ne estas malofta kontribuanto por nia revuo, nun prezentas al niaj legantoj unu el la plej signifaj kreantoj de la Esperanta literaturo: Marjorie *Boulton.* Literaturamantojn certe ĝojigos ankaŭ la bela novelo de A. *Végh,* populara hungara prozisto.

Esperanto estas la temo de la kvarpaĝa intervjuaro, kiu sondas pri la opinio de gvidantoj de gravaj naciaj kaj internaciaj junularaj organizaĵoj. Niaj kunlaborantoj paroligis la unuan sekretarion de la Lenina Komsomolo de Sovetunio, prezidanton de la Internacia Unuiĝo de la Socialisma Junularo, kaj ankoraŭ kvin aliajn gravulojn. La intervjuoj montras, ke la junularaj organizaĵoj klare vidas la mondan lingvan problemon, sed iuj el ili estas terure sensciaj pri Esperanto – kaj tio estas nete nia kulpo.

En tiu ĉi numero ekas nova serio pri la «regionoj de Hungarlando». Premiere ni prezentas la departementon Hajdú-Bihar, kie troviĝas ankaŭ Hortobágy, la konata hungara «Puszta» (stepo); iom kaprice Hortobágy-a sceno paradis sur la titolpaĝo de nia antaŭa numero. Leginte la artikolon, revenu do al la antaŭa numero de HV, sed firme ni esperas, ke vi ŝatos ankaŭ la nunan titolpaĝon, kiu portas al vi verkon de nuntempa elstara pentristo.

Fine, sed ne laste, en tiu ĉi numero ni primemoras la 100-an datrevenon de la naskiĝo de Béla Bartók, unu el la plej elstaraj figuroj de la muzikhistorio de nia jarcento. Ĉar la muziko ne konas lingvajn problemojn, liaj verkoj povis disfamiĝi praktike en la tuta mondo, sekve ni rajte esperas, ke nia artikolo pri Bartók tuŝos intimajn kordojn en la animo de multaj niaj legantoj. Kaj se estas tiel – do finu la legadon de tiu ĉi enkonduko kaj turnu la paĝon!

# *Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Béla Bartók*

La apero de Béla Bartók en la muzika mondo signifis komencon de nova erao, ne nur en la muzikhistorio de Hungario, sed ankaŭ en la universala muzikkulturo. Estas inde, ke nun, kiam ni rememoras pri la centjara datreveno de lia naskiĝo, ni tuŝe konigu lian vivoverkon.

Béla Bartók naskiĝis la 25-an de marto 1881, en la suda parto de la tiama Hungario, en vilaĝo Nagyszentmiklós (nun *Sinnicolaul Mare* en Rumanio). Li heredis la muzikan talenton de siaj gepatroj, kiuj klopodis iniciati amatoran muzikan vivon en la vilaĝo. Liaj fortepianlecionoj komenciĝis ĝuste je lia kvina naskiĝtago. Baldaŭ la gepatroj ĝoje konstatis, ke la eta Béla havas absolutan muzikan orelon.

Li estis naŭjara, kiam li komencis komponadi muzikon, kaj 11-jara li debutis kiel juna koncert-fortepianisto. Pli profunda muziklernado sekvis en urbo Pozsony (nun Bratislava en Ĉeĥoslovakio), kie László Erkel (filo de Ferenc Erkel, konata hungara komponisto de romantismaj operoj) transprenis la taskon de lia muzika instruado. Intertempe mortis lia patro. Lia patrino ne ricevis tuj postenon, ili devis plurfoje ŝanĝi sian loĝlokon. Krome la juna Béla ofte malsaniĝis, kaj pro tiuj cirkonstancoj lia muzika progreso okazis iomete malrapide.

Al liaj unuaj komponaĵoj apartenas *La fluo de la Danubo,* verko por fortepiano, en 1892. Tiam pri lia talento ekatentis lia tiama muzikinstruisto en Sopron. La familio ekloĝis definitive en Pozsony kaj en la atmosfero de la historia muzikkulturo de la urbo sub la gvido de la instruistoj L. Erkel kaj Gyrtl disvolviĝis la talento de Béla Bartók.

La dekokjara junulo prezentis sin en la Budapeŝta Muzikakademio al profesoro Thoman, kiu akceptis lin disĉiplo-fortepianisto. La komponadon li lernis ĉe profesoro János Koessler. Ambaŭ liaj profesoroj akceptis lin en la duan klason de la Akademio. Intertempe plurfoje atakis lin tuberkolozo, pro kiu li devis perdi tutan instrujaron kaj portempe ŝajnis, ke li devos rezigni pri la muzika kariero. Tamen, en Aŭstrio li sukcesis resaniĝi kaj li daŭrigis siajn muzikajn studojn.

Kiel 21-jara junulo li aŭskultis la simfonion de R. Strauss *Also sprach Zaratustra* („Tiel parolis Zaratustra"), kaj tiu travivaĵo vekis en li profundajn impresojn. De tiam li denove komencis komponi kiel adepto de R. Strauss. En 1903 sub la influo de la politikaj luktadoj kaj patriotaj movadoj en li maturiĝis la decido per la muzika agado servi la nacian kulturon. Tiam li verkis la Simfonion Kossuth, kiu lia verkaĵo jam spegulas la efikon ne nur de R. Strauss, sed ankaŭ tiun de Ferenc Liszt.

## Kolektante folkloron kun Kodàly

Dum la unuaj jaroj de la jarcento li ofte faris koncertvojaĝojn dise en Eŭropo, eĉ en Afriko. Intertempe ekkoninte la same famiĝintan hungaran komponiston Zoltán Kodály, ili sisteme kolektis hungaran kaj slovakan popolmuzikon. Poste li kompletigis sian kolektan laboron en Transilvanio (nuntempe okcidenta parto de Rumanio) kaj komencis kolekti ankaŭ rumanan popolmuzikon.

En 1907 oni nomis lin profesoro de la Muzikakademio kaj li fariĝis posteulo de I. Thoman. La saman jaron li komponis sian unuan *Violonkoncerton*. Pro diversaj malfacilaĵoj la prezento de tiu ĉi verko okazis nur post lia morto, en Basel (1958). La intertempe de li komponitaj *Suitoj I* kaj *II* jam rimarkeble montras la spurojn de la popolmuzika efiko. Ties plua rezulto estis la signifoplena *Arĉkvarteto I.* En jaro 1910 dum du vesperoj li aranĝis kune kun Kodály komunan aŭtoran prezentiĝon. Tiuj koncertoj fariĝis konsiderindaj okazaĵoj de la historio de la nova hungara muziko.

Grava mejloŝtono estis en lia komponista agado la jaro 1911. Tiam maturiĝis en li la penso de teatra verkaĵo, por kiu li elektis la fame konatan temon *La burgo de la blubarba princo.* La teksto de la opero verkis Béla Balázs, talenta figuro de la tiama juna verkist-generacio. Bartók laboris duonjaron por pretigi la operon, kiu pli ĝuste povas nomiĝi mistero. La teksto de Balázs forte impresis la kompon-iston kaj donis al li okazon koncepti sian novan mondon.

La historio de la virinadoranta Blubarbulo estas tre malnova. Ĝia heroo – laŭ la legendo – mortigis siajn sep edzinojn. La temo estas propre unu el la parencoj de la Donĵuan-legendo kaj kune kun tiu ĝi estas unu el la Eŭropaj artismaj temoj, kiujn oni prilaboris plej multe. La rolantoj rakontas timigajn, eksterordinarajn aĵojn pri la baza problemo de la socio, t.e. pri la kontakto de viro kaj virino.

La akcepto de lia unuakta mistero ne estis favora. Ĝia muziko relative malrapide trovis plaĉon ĉe la publiko. La nova muzika stilo longtempe estis malfacile digestebla por la publiko, alkutimiĝinta al la artismaj formoj de la 19-a jarcento.

Junaj muzikistoj, inter ili ankaŭ Bartók fondis la Novan Hungaran Muzikasocion, precipe por tio, ke ĝi servu por la hungara orkestra kulturo kaj cele de altnivela prezento de novaj verkoj. Sed la asocio ne longe funkciis. Pro la kritikoj kaj la nekompreno de la publiko, krome pro tio, ke lia unua opero ne ricevis premion, Bartók retiriĝis de la publika agado. En la sekvaj jaroj la plimulton de sia forto – krom al la instruado – li dediĉis al la popolmuzika kolektlaboro, helpe de sia edzino. Lia unua edzino estis Márta Ziegler, unu el liaj disĉiplinoj. Al ŝi li dediĉis kelkajn verkojn, interalie la misteron *La burgo de la blubarba princo.*

Pro la jam menciita retiriĝo Bartók dum kelke da tempo verkis nur por la tirkesto. Tiel naskiĝis en 1912 *Kvar orkestraj verkoj*, kaj la instrumentado kaj prezento de tiuj verkoj okazis nur post dek jaroj. „Tiu longa prokrasto multe atestas pri niaj muzikaj cirkonstancoj" – skribis en la *Revue Musical* post la prezento Kodály.

En 1913 Bartók kune kun Kodály kolektis araban popolmuzikon en Nord-Afriko. Poste ili komune prezentis planon al la Societo „Kisfaludy" (grava kaj potenca societo en la tiama kultura vivo) pri la esploro de popolmuziko. Sed pri ilia plano venis nenia reago. Malgraŭ la fiasko, Bartók volis daŭrigi sian studvojaĝon. Tamen, pro la intertempe komenciĝinta milito li



La junaj Bartók kaj Kodály

devis rezigni pri tiuj siaj planoj. Kun la rumana folkloristo Buŝitia li estigis intiman kontakton, sed pro tio, ke ankaŭ Rumanio aliĝis al la mondmilito, kaj pro la malsaniĝo de la edzino, li ĉesigis la esplorlaboron.

## Verkante baletojn

Kiam la unua spasmo de la milito iom mildiĝis, Bartók denove komencis komponi. Jam de 1913 li okupiĝis pri la nova verko de Béla Balázs: *Reĝido, skulptita el ligno.* Ĉar la Operdomo ne volis prezenti lian unuan teatraĵon, facile li cedis al la deziro, t.e. ke li verku baleton. Por la verkota baleto la nova teksto de Balázs montriĝis konvena, kaj tiel verkiĝis la dua teatraĵo de Bartók. Ĝi estis prezentita en 1917, sub la direktado de la eminenta dirigento Egisto Tango. La verkaĵo havis grandan sukceson, kiu montris, ke la etoso de la publiko sanĝiĝis. En la jaro 1918 *La burgo de la blubarba princo* jam samtempe troviĝis kune kun la *Reĝido, skulptita el ligno* sur la scenejo de la Budapeŝta Operdomo.

La atingitaj sukcesoj forte instigis lin, ke li daŭrigu la komponadon de teatraĵoj. Li ricevis taŭgan tekston de Menyhért Lengyel kaj tiel li komencis komponi sian sekvan teatran verkon *La mirinda mandareno**. Printempe de 1919 li finis la komponadon pri la stranga temo, kiun M. Lengyel nomis „pantomimo groteska", Tiu baleto povis esti prezentita en Budapeŝto nur post 1945. Intertempe en 1927 oni prezentis ĝin en Prago, kun granda sukceso.

* Tiu novelo de M. Lengyel aperis en la n-ro 1980/2 de HV.



La mondkonata subskribo

Dum la Konsilia Respubliko (1919) Bartók fariĝis membro de la muzika direktorio, kune kun Zoltán Kodály kaj Erno Dohnányi.

Printempe en 1922 li koncertis en Transilvanio, poste en Anglio kaj Francio. De tiam li pasigis sian tempon ofte en eksterlandaj koncertvojaĝoj. Tiuj Eŭropaj vojaĝoj fundamentis por li la internacian reputacion. La sekvan jaron oni prezentis lian *„Dancsuito"*-n, en kiu Bartók volis omaĝi al la frateco de la popoloj. En Rumanio oni aranĝis grandan solenaĵon je lia honoro, la rumana reĝo distingis lin per alta ordeno.

Lian unuan fortepian-koncerton oni prezentis en 1926. En tiu li aperis antaŭ la publiko kun nova tono, kun nova komponista sinteno. Poste sekvis la jaroj de grandaj vojaĝoj. Li pasigis monatojn en Usono, kie lia *Arĉkvarteto III* gajnis unuan premion. Post tio li faris sian unikan koncertvojaĝon tra Sovetio.

La konatan verkon *Kantato profana* li komponis en 1930. Poste denove sekvis longa retiriĝo: dum ses jaroj en Hungario li tute ne ludis siajn verkojn.

Okaze de lia 50-a naskiĝtago oni distingis lin per la kruco de la Franca Honorlegio kaj per la hungara Corvin-florkrono. Ĉi lastan distingon li tute ne transprenis.

*pian-koncerto II.*

Komence de la tridekaj jaroj li retiriĝis de la instruado kaj verkis sian eseon: „Nia popolmuziko kaj tiu de la najbaraj popoloj". La Hungara Akademio de Sciencoj elektis lin membro; li faris sian inaŭguran paroladon pri la „Problemoj ĉirkaŭ Liszt" (1936). En la sama jaro li komponis la popularan simfonian verkon *Muziko por kordaj kaj batinstrumentoj kaj celesto.* Aŭtune de 1937 Bartók malpermesis la prezentadon de siaj verkaĵoj en la radiostacioj de la faŝisma Italio kaj la nazia Germanio.

## Veturonte al Usono

Post la Hitlera okupado de Ĉeĥoslovakio li komencis saveksporti siajn verkojn en Svision, poste en Anglion. En Svisio li komponis sian *Divertimenton*, kaj la *Arĉkvarteton VI.* Intertempe definitive maturiĝis en li la penso forlasi Eŭropon. En oktobro de 1940 en koncerto li adiaŭis la Budapeŝtan publikon, kaj per ŝipo vojaĝis al Ameriko.

Apenaŭ li ekloĝis en Nov-Jorko, tuj li komencis plenumi la antaŭe fiksitajn koncertdevojn, tamen aperis la zorgoj pri la vivteno. En 1943 okazis lia lasta publika rolado, ĉar lia malsano fariĝis ĉiam pli grava. La kuracistoj konstatis, ke lin suferigas leŭkemio.

En la jaro 1944 lia sanstato iom pliboniĝis. Li sentis sin sana. Je la peto de Yehudi Menuhin li verkis la *Violonan solosonaton.* Dum la tuta jaro li fartis bone kaj en decembro li povis partopreni la grandsukcesan prezenton de sia *Koncerto* en Boston. La sekvan printempon li havis pneŭmonion, sed baldaŭ li resaniĝis. Tamen lia sanstato denove malboniĝis. Dum sia somera feriado li finis la komponadon de sia lasta verkaĵo, la *Fortepian-koncerto III.* Komence de septembro lia sanstato denove malboniĝis. Li devis resti en hospitalo, sed oni jam ne povis savi lin. La 26-an de septembro 1945 li mortis. Ĉe lia entombigo adiaŭis lin nur kelkaj liaj amikoj.

Bartók estas unu el la korifeoj de la moderna Eŭropa muziko. Forlasinte la romantisman tendencon de sia junaĝo, li iniciatis aŭdacan kaj novecan stilon, kiu apogas sin je la popola melodiaro, reprezentas specialan ritmon kaj harmonian mondon, kaj per tiuj ĝi malfermas eblon por nova muzika esprimado. Argidis lin humanismo kaj sopiro de la socia progreso.

Lia muzikscienca agado ne estis malpli grava, ol lia komponista laboro. La esploroj, per kiuj li celis ekkoni la folkloron ne nur de la propra kaj de la najbaraj popoloj, sed ankaŭ tiun de ukrainoj, bulgaroj kaj turkoj, havis epokfaran signifon. Tamen, antaŭ ĉio li estis unu el la plej grandaj komponistoj de tiu ĉi baldaŭ finiĝonta jarcento.

István *László*

Bartók survoje al Usono

# „Bartók-jaro" en Hungario

1981 estas por ĉiuj hungaroj unuavice jaro de la Bartók-jubileo. La grandegan signifon de la muzikverkoj de Bartók ja konscias ne nur muzikamantoj; la Bartókaj komponaĵoj fariĝis iasence simboloj de moderneco, kuraĝa prezento de la doloriga realo en la tuta hungara arto, ne nur muzika. La poeto Gyula *Illyés* jene respondas al tiuj, kiuj trovis la muzikon de Bartók nekomprenebla, senharmonia, dissona:*

*„Dissonon? " Jes! Se por ili disson',*
*kio por ni estas konsol'!*
*Jes, ekkrakantan*
*krevbruon miksan kun blasfem'*
*de glas' falinta, ve-ŝrikantan*
*grincadon de fajlil' en interprem'*
*de segildentoj lernu kaj*
*violon' kaj kanta gorĝ' – ne estu gaj'*
*nek pac' en la orita kaj elita*
*muziksalono fajna, forfermita,*
*dum ne en ĉiu koro mornrigida.*

Do, la festado de la centjara jubileo de Bartók ne estas tasko kaj privilegio de la muzikaj rondoj, sed de la tuta hungara popolo. Pro tio jam en la pasinta jaro fondiĝis memorkomitato el la plej elstaraj figuroj de la hungara kultura kaj politika vivo; la komitaton estras Pál *Losonczi*, prezidanto de la Hungara Popolrespubliko. Similaj komitatoj fondiĝis ankaŭ en pluraj landoj, interalie en Sovetio, Finnlando, Francio, Federacia Respubliko Germanio ktp. Ankaŭ UNESCO iniciatas plurajn primemorajn festajn koncertojn. Oni notu tamen, ke ne Bartók kaj lia verkaro bezonas nian specialan atenton dum tiu ĉi jaro, sed ni mem bezonas doni al ĝi specialan atenton, ja liaj verkoj estas neelĉerpeblaj fontoj de intelekta kaj senta riĉeco.

La kulmino de la jubileo okazis la 25-an de marto en Budapeŝto: en la festa koncerto partoprenis interalie ankaŭ la mondfamaj junaj pianistoj Zoltán *Kocsis* kaj Dezső *Ránki*, kiuj prezentis fragmentojn el la „Mikrokosmo".

La verkoj de Bartók konsistigos la ĉefan parton ankaŭ de la programo de la Budapeŝtaj Muzikaj Semajnoj, kaj per Bartók-verkoj oni festos en Hungario la 1-an de oktobro, la tutmondan tagon de muziko. Dum la somero la moderna baletensemblo de Pécs ankaŭ prezentos Bartók-verkojn.

Tamen, oni ne forgesas, ke la muzikverkoj estas nur unu faceto de la agado de Bartók. Krom granda komponisto, li estis ankaŭ elstara muziksciencisto, kolektanto de folklormuziko, ŝatata muzikpedagogo, kaj li faris multe ankaŭ por la evoluigo de la ĥora aktivado en Hungario; tiu multflankeco de lia vivo respeguliĝas ankaŭ en la programo de la jubilea jaro.

Bartók tostas en Usono

Bartók mortis en Usono, kaj kiam tiuj ĉi linioj estas surpaperigataj, liaj cindroj restas ankoraŭ tie, sed ekzistas la espero, ke dum la jubilea jaro ili povos reveni al Hungario, kaj lokiĝi en nia Nacia Panteono. Tio fakte estus la plej inda dankesprimo fare de la nacio al sia granda filo.

* La tuta poemo estas legebla en la n-ro 1973/2 de Hungara Vivo (Trad. K. Kalocsay.)

# La internacia junulara kunlaboro kaj la lingva komunikado

Pli ol kvincent eŭropaj junularaj kaj studentaj organizoj estis reprezentitaj far tiuj gejunuloj, kiuj fine de oktobro de la pasinta jaro – post jardeko de preparlaboroj – kreis en Budapeŝto la Kadro-organizon por Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro, kaj akceptis ties Konstituantan Dokumenton kaj Laborplanon. En tiu ĉi kunlaboro aktive partoprenas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

Dum la konferenco ni faris intervjuojn, petante la gvidantojn de pluraj gravaj junularaj organizoj rakonti pri sia laboro, diri sian opinion pri la problemoj de la internacia komunikado, kaj pri tio, kiajn eblojn ili vidas por kunlaboro kun TEJO. (Simila intervjuo jam estis farita kun Ernesto Ottone Fernández, prezidanto de Monda Federacio de Demokratia Junularo. Ĝi aperis hungarlingve en la revuo *Világ és Nyelv* n-ro 1980/3; kaj Esperante en *Budapeŝta Informilo* n-ro 1980/4 kaj *Bulgara Esperantisto* n-ro 1980/9.)

●●●

**Boris Nikolajeviĉ Pastuhov, unua sekretario de Lenina Komsomolo de Sovetunio:**

La entuziasmo pri Esperanto kaptas ĉiam pli kaj pli grandajn amasojn de la soveta junularo. Niaj gejunuloj vidas en ĝi interesan, aktivan kanalon, kiu ebligas interkomunikiĝi pli intense kun la junularo de Eŭropo kaj de la tuta mondo. Nia Komsomolo estas unu el la fondintoj de nia Asocio de Esperantistoj kaj ni klopodas kiel eble plej energie enkonduki tiujn praktikajn formojn de laboro, kiuj povus kontentigi tiun ĉi kreskantan interesiĝon, tiun ĉi entuziasmon.

Inter la Hungara Komunisma Junulara Asocio kaj Lenina Komsomolo delonge jam ekzistas elstaraj rilatoj de amikeco kaj frata kunlaboro. Ŝajnas al ni, ke ni devas dediĉi atenton ankaŭ al Esperanto, – interesanta kaj la hungarajn kaj la sovetajn gejunulojn –, kiam ni parolas pri novaj ebloj de amika kunlaboro inter junularaj kolektivoj, gejunuloj de diversaj urboj kaj regionoj de niaj landoj. Mi pensas, ke ni ankoraŭ havos okazon interparoli kun la kamaradoj, gvidantaj la Hungaran Komunisman Junularan Asocion, pri tio, kiamaniere ni povus efike disvastigi ĝin en la frataj socialismaj landoj.

Nun en Budapeŝto okazas eventoj, kiuj devos ludi eksterordinare gravan rolon en la historio de la demokratia junulara movado. Temas pri tio, ke sukcese finis sian laboron la Konstituanta Asembleo, kiu signifis kreon de la Kadro-organizo por Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro. Mi esperas, ke en tiuj laborplanoj kaj agadprogramoj, kiujn la reprezentantoj de junularaj organizoj pridiskutas ĉi tie, ankaŭ Esperanto, tiu ĉi tre interesa kaj utila agad-tereno de gejunuloj, okupos indan lokon

**Hilary Barnard (Britio), prezidanto de Internacia Unuiĝo de Socialisma Junularo (IUSY):**

Nia organizo fondiĝis en 1907, ĝia sidejo estas en Vieno. Nuntempe sur ĉiuj kontinentoj, entute en 43 landoj troviĝas niaj 56 membro-organizoj, kies plimulto estas la junularaj sekcioj de socialismaj, socialdemokratiaj, labor- kaj popolpartioj.

IUSY okupas sin pri la problemoj de studentoj, junaj laboristoj, de gejunuloj vivantaj inter malfacilaj cirkonstancoj. La devizoj „paco" kaj „justeco" gvidas nin en nia agado.

Ni havas vastajn internaciajn rilatojn. Parto de niaj membroorganizoj apartenas al partioj nuntempe regantaj en siaj landoj, sed ni havas ankaŭ mem-

# La internacia junulara kunlaboro kaj la lingva komunikado

bro-organizojn, agantajn eksterleĝe, ekzemple en Ĉilio. Ni havas kontaktojn ankaŭ kun la liberigaj movadoj de Sud-Afriko, ni apogas ilian lukton.

Niaj membro-organizoj pridiskutas la plej diversajn demandojn (energi-problemojn, medioprotektadon, atomenergion, senlaborecon ktp.) kaj – kvankam ilia starpunkto ne ĉiam koincidas – ili klopodas trovi solvojn de la problemoj.

Parolante pri la komunikadaj problemoj de internaciaj junularaj organizoj, necesas konstati, ke kvankam tiuj ĉi organizoj uzas plurajn lingvojn (la oficialaj lingvoj de IUSY estas la angla kaj la hispana), la plej granda malhelpo estas la malsamaj politikaj kaj kulturaj fonoj kaj strukturoj. Nepre necesas formi pli bonan komunikadan sistemon ol la hodiaŭa. Estas grava problemo ekzemple, ke nur ege malgranda parto de la junularo scias pri la diskutoj, okazontaj nun ĉi tie en Budapeŝto. Ni devas doni pli da ebloj por altiri gejunulojn, kiuj vivas inter malbonaj cirkonstancoj.

Ni estas pretaj kunlabori kun ĉiuj organizoj, kiuj kontribuas al la interkompreniĝo de nacioj kaj al la lukto kontraŭ la subpremo. La celoj de la esperantistaj gejunuloj estas konataj al ni, kvankam ni ne havis proksimajn interrilatojn kun ili. Tamen en la estonteco ni dezirus ricevi pli da informoj pri la agado de TEJO. Miaopinie la kunlaboro inter la du organizoj estus utila, kaj ni ĝojus, se ni trovus la eblon por komuna laboro.

**Franz Küberl, vicprezidanto de la Konsilio de Eŭropaj Junularaj Komitatoj (CENYC), prezidanto de la Aŭstria Junulara Konsilio:**

Nia organizo fondiĝis en 1963, kun sidejo en Bruselo. Nuntempe la naciaj junularaj konsilioj de 15 okcident-eŭropaj landoj apartenas al CENYC. Nia tasko estas ellabori komunan starpunkton pri tuteŭropaj kaj ceteraj internaciaj demandoj. Krom tio ni helpas la kunlaboron inter junularaj organizoj kaj la informfluon inter la diversaj organizoj.

Kompreneble niaj membroj en la diversaj landoj parolas malsamajn lingvojn. La laborlingvo de CENYC estas la angla kaj la franca, kaj la plimulto de niaj junularaj gvidantoj parolas en unu el tiuj lingvoj. Tamen se iu aparta grupo de landoj organizas ian aranĝon, ni ofte uzas la lingvon de tiuj landoj. Ekzemple dum niaj kunvenoj en Skandinavio ni uzadas ankaŭ iun skandinavan lingvon apud la angla kaj la franca.

Tamen la problemo de komunikado estas ne nur lingva problemo. La mankoj de la informfluo kaŭzas malfacilaĵojn ne nur inter la diversaj junularaj organizoj. Eĉ ene de la organizoj ne estas kontentiga la informado de la membraro, kaj ties partopreno en la eventoj. Dum la sekvontaj jaroj ni devos labori por solvi tiujn ĉi problemojn kaj krei kontentigan informadan sistemon.

Koncerne la kunlaboron kun TEJO, estus utile regule interŝanĝi informojn. Sed la laborforto de CENYC estas limigita kaj havas aliajn taskojn ol okupiĝi pri la lingvaj problemoj.

Pri Esperanto mi povas esprimi nur mian propran opinion. Pri la lingvo mem mi havas neniajn praktikajn spertojn. La ideo de Esperanto teorie estas ege pozitiva, tamen ni devas vidi la konkretajn terenojn, kie ni vere povus utiligi ĝin. La gejunuloj, konsistigantaj la membraron de nia organizo, vidas, ke la angla lingvo estas pli utila, ĝi donas pli da ebloj por internacia kontaktiĝo. Mi scias, ke por vi ne estas tre utila, kion mi diras, sed mi devas konstati, ke en la proksima estonteco pro praktikaj kialoj Esperanto ne povos akiri signifan rolon. Tiucele ĝi devus fariĝi parto de la eduka sistemo en tuta Eŭropo, kaj nuntempe ne ekzistas tiaj ŝancoj.



**Lennart Rhodin (Svedio), prezidanto de la Internacia Federacio de Liberala kaj Radikala Junularo (IFLRY):**

Nia Federacio konsistas el 35 membro-organizoj – kies plimulto troviĝas en Okcidenta Eŭropo – kun proksimume 200–250 mil anoj. Nia sidejo estas en Linköping, Svedio. Nia plej grava celo estas la evoluigo de la tuteŭropa junulara kunlaboro, sed ni okupiĝas ankaŭ pri la problemoj de malarmado, pri la ebloj de la kreo de nova internacia ekonomia ordo, pri la medioprotektado kaj ŝparado de naturaj riĉaĵoj (multaj el niaj membro-organizoj kon-

# La internacia junulara kunlaboro kaj la lingva komunikado

traŭas la uzadon de atomenergio en siaj propraj landoj), kaj pri diversaj aspektoj de la homaj rajtoj.

Koncerne la lingvan komunikadon, ankaŭ por ni ĝi estas grava malhelpo, kaj ni ne povis trovi ties kontentigan solvon ĝis nun. La oficialaj lingvoj de IFLRY estas la angla kaj la franca. Tial, ke ĉiam pli malfacile certigeblas la interpretado kaj – aliflanke – en ĉiuj niaj membro-organizoj troviĝas personoj, parolantaj la anglan, ni ofte uzas eksklu-zive la anglan. Kompreneble tiu situacio signifas diskriminacion kontraŭ tiuj, kiuj ne parolas la anglan aŭ kies gepatra lingvo ne estas la angla.

La problemoj de komunikado estas tre vastaj. Ekzemple al multaj gejunuloj estas fremdaj tiaspecaj konferencoj kiel la jena. Tutcerte preskaŭ neniu ordinara membro de la partoprenantaj organizoj ĉeestas ĉi tie. Sed eĉ se ili ĉeestus, ili ne povus facile interparoladi pri siaj propraj problemoj. Se ni volas plilarĝigi la tuteŭropan junularan kunlaboron kaj partoprenigi en ĝi pli da simplaj gejunuloj, ni nepre devas okupiĝi pri tiu ĉi komunikada problemo.

La solvo de la lingvaj problemoj, proponata far la Esperantistoj, estas inda je rekono. Tamen mi opinias, ke en la proksima estonteco ĝi ne solvos la lingvajn problemojn de la internacia junulara kunlaboro. Tio bezonas planadon por pli longa tempo.

La ĵus fondita Kadro-organizo por Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro kreos pli favorajn ol ĝis nun kondiĉojn por la evoluigo de duflankaj kontaktoj. Tiamaniere la kunlaboro ankaŭ inter TEJO kaj IFLRY povos plifortiĝi.



**Volkmar Kallenbach (FRG), prezidanto de la Eŭropa Kunordiga Buroo por Internaciaj Junularaj Organizoj (ECB):**

La Eŭropa Kunordiga Buroo – kun sidejo en Bruselo – havas kiel sian ĉefan taskon la plibonigon de la inform-fluo inter la internaciaj junularaj organizoj, kunordigo de ilia agado, certigo de ebloj por multflankaj konsultiĝoj. La Kunordiga Buroo ne formas memstaran politikan starpunkton, lasante tiamaniere malferma la vojon por la organizoj, apartenantaj al ĝi, ellabori sian propran politikan platformon, sian strategion.

En tiuj ĉi organizoj membras gejunuloj de diversaj landoj. Ankaŭ niaj financaj ebloj estas limigitaj kaj tial ni devis elekti praktikan vojon por solvi la lingvan problemon. ECB uzas du oficialajn lingvojn: la anglan kaj la francan. Dum ĉiu pli larĝa konferenco, kunsido estas certigata samtempa interpretado. Tamen dum la kunsidoj de nia prezidio ni ne disponas pri tiaj ebloj. En ĝi la angle- kaj la france-parolantoj evoluigis sian scion de la franca lingvo – kaj inverse. Sekve la angle-parolantoj kontinuas elpaŝi angle kaj la france-parolantoj france, sed jam ĉiuj komprenas unu la alian eĉ sen interpretado.

Kompreneble la lingva problemo fariĝas multe pli malfacila, kiam pli kaj pli da junaj homoj partoprenas la internacian kunlaboron. En la lastaj jaroj iom pliboniĝis la lingvo-scio de la junularo, sed ne sufiĉe por garantii senĝenan komunikadon.

ECB havas bonajn interrilatojn kun TEJO, sed nature ĉi tiuj kontaktoj ne estas tiel proksimaj, kiel kun niaj membro-organizoj. Ni ĝojus, se eblus ŝanĝi tion, kaj TEJO aliĝus al ECB, ankaŭ tiamaniere plifortigante ĝian kunlaboron kun niaj aliaj membro-organizoj.



**Egon Slopianka (FRG), Eŭropa sekretario de la Kristana Asocio de Junaj Viroj (YMCA):**

Nia asocio fondiĝis en 1855, kaj nuntempe ĝi havas membro-organizojn en 90 landoj entute kun proksimume 25 milionoj da anoj. Nia sidejo troviĝas en Ĝenevo. Nia celo estas la evoluigo de la homo kiel individuo anime, mense kaj fizike. Kiel kristana organizo la evoluon de la homa animo ni helpas laŭ la instruoj de Jesuo Kristo. Ni multe laboras ankaŭ por la intelekta kaj korpa plibonigo de la homo. Ĉi lastan pruvas interalie, ke ekzistas eĉ du sport-branĉoj, kiujn eltrovis YMCA: la korbopilko kaj la flugpilko.

La internacia lingva komunikado estas granda problemo ankaŭ por ni. Nia asocio havas kvar oficialajn lingvojn: la germanan, la anglan, la francan

# La internacia junulara kunlaboro kaj la lingva komunikado

kaj la hispanan. Tamen dum niaj internaciaj aranĝaĵoj, okazantaj en la plej diversaj mondpartoj, ni uzas ankaŭ la lokajn lingvojn – kun interpretado.

La internacia komunikado estas ankaŭ kultura problemo, ja la lingvo estas pli ol aro da vortoj. Ege grava estas la konduto de la homoj, ilia sinteno koncerne la diversajn demandojn. Ni ne kredas ekzemple, ke la grandaj politikaj oratoraĵoj pliproksimigas la malarmadon aŭ la pacon. La homoj devas pridiskuti la problemojn kiel individuoj; ili devas provi lerni unu de la alia. Necesas fidi unu la alian kaj ni ĉiuj devas labori kune.

La homa lingvo estas nedisigebla de ĉio ĉi, ĉar ekzistas tre proksima interrilato inter la konduto kaj la parolata vorto. La homo esprimas sian konduton, siajn emociojn ankaŭ per la parolata lingvo.

Unuflanke ni instigas la homojn lerni fremdajn lingvojn, kaj aliflanke ni opinias, ke necesus multe pli profunde ol hodiaŭ esplori la lingvon kiel ilon de internacia komunikado. Mi pensas, ke multaj problemoj de la mondo solviĝus, se ĉiuj posedus unu komunan lingvon. Mi konas plurajn esperantistojn persone kaj mi tre ĝojus, se ni povus establi pli proksimajn kontaktojn kun TEJO. Por ni estus ege interese ekscii, kiamaniere oni povas venki la obstaklojn, fontantajn el la malsamaj kulturoj kaj tradicioj, helpe de unu komuna lingvo.

**Jos Lemmers (Nederlando), membro de la Plenumkomitato de la Junulara Movado por Nova Internacia Ordo (NIO-Junularo):**

Nia movado, kies sidejo troviĝas en Amsterdamo, havas membro-organizojn en preskaŭ tridek landoj. Nian movadon konsistigas gejunuloj, kiuj luktas por la kreo de Nova Internacia Ekonomia Ordo, por la ideoj de socia kaj ekonomia justeco, por la malarmado, la sekureco, la homaj rajtoj, la protektado de la homa medio.

En la lukto por Nova Internacia Ordo ankaŭ la demando de la komunikado devas okupi elstaran lokon. Nia organizo uzas unuavice la anglan, kaj malpli ofte la francan kaj la hispanan. Tamen estas dezirate, ke en la establigota nova mond-ordo ni ne

**La partoprenantoj de la Konferenco**

dependu de tia lingvo kiel la angla, kiu signifas kulturan superregadon. Ni bezonas alternativojn, kvankam ne estas facile krei dum mallonga tempo internacian komunikadan ordon, kiu baziĝus sur tia lingvo, kia estas ekzemple Esperanto.

Ni apenaŭ scias, kiel funkcias Esperanto en la praktiko kaj ĝuste pro tio nin tre interesus la ĉirilataj spertoj de TEJO; ni ege volus ekkoni ilin.

Konforme al ĉio ĉi ni apogos ĉiujn proponojn, celantajn la pli profundan kaj seriozan okupiĝon pri la problemoj de la internacia komunikado en la Kadro-organizo por Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro.

* * * * *

La Budapeŝta konferenco malfermis novajn vojojn antaŭ la junaj esperantistoj. Ne nur pro tio, ke personaj kontaktiĝoj ebligis interparoladi kun la gvidantoj de pluraj gravaj internaciaj junularaj organizoj, rakonti al ili pri la lingvaj problemoj kaj pri Esperanto. Kaj ne nur pro tio, ke la reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj gravaj eŭropaj junularaj organizoj povis aŭskulti la esperantlingvan paroladon (samtempe interpretitan en aliajn lingvojn), de Csaba *Lendvay*, prezidanto de TEJO, pri la celoj kaj agadoj de TEJO. Sed ankaŭ pro tio, ke ekde nun TEJO estas organika parto de la Kadro-organizo por Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro. Tiel TEJO regule partoprenas la agadon de la kreitaj laborgrupoj (interalie la laborgrupojn pri la kreo de nova internacia ekonomia ordo, pri la medioprotektado kaj pri la junulara turismo).

Estas nature, ke al tiu ĉi agado aktive aliĝis ankaŭ anoj de Hungara Esperanto-Junularo.

La intervjuon faris: Péter *Broczkó*
Zsŏfia *Kóródy*
András *Lukács*
Kompilis kaj esperantigis: András *Lukács*

# Bilanco de kvin jaroj

Fine de februaro la Centra Statistika Oficejo de Hungario publikigis sian raporton pri la evoluo de la hungara ekonomio en la jaroj 1976–1980. Dum tiu ĉi periodo la bazo de la ekonomia laboro estis la 5-a Kvinjara Plano, akceptita en 1975.

## Intertempaj ŝanĝoj

En nia lando kvinjaraj planoj ordinare sufiĉe detale difinas la celojn kaj rimedojn de la ekonomia evoluo. Tiu preciza detalado antaŭ kelka tempo montriĝis nepre utila, ja ĝi ebligis ankaŭ la planadon de la harmonia kunlaborado inter la diversaj branĉoj de la ekonomio. Oni povas diri, ke la planoj ĉiam estis ambiciaj, sed realaj, kaj plej ofte oni sukcesis plenumi aŭ iomete superplenumi ilin.

En 1975 la hungaraj ekonomiistoj – eble iom tro optimisme – supozis, ke la «freneziĝo» de la naftoprezo estas fenomeno escepta, provizora, kaj esperis, ke ili baldaŭ refalos al la antaŭa nivelo, aŭ en plej malbona kazo la inflacio detruos ilin. Pro tio oni planis daŭrigi la pli fruan rapidan ampleksigon de la produktado kaj la intensan ekonomian aktivadon. Ĉio ĉi estis bazita sur la supozo de moderaj energiokostoj.

## Nova strategio

Ĝis la fino de 1978 nia ekonomio fidele sekvis la planon, sed tiam evidentiĝis, ke la altiĝado de la energiokostoj estas daŭra procezo. La ampleksigo de la produktado necesigis kreskantan importon – unuavice de nafto kaj krudmaterialoj –, sed la eksporto ne kreskis adekvate. Pro tio fine de la jaro 1978 oni decidis ŝanĝi la strategion, malrapidigi la ampleksigon de la produktado, kaj paralele kun tio pliefikigi ĝin.

## Malpli altaj ciferoj

Pro tio la ĵus publikigita raporto informas pri pli modestaj ciferoj, ol oni atendus. La nacia enspezo kreskis dum kvin jaroj nur 17% (la plano antaŭvidis preskaŭ la duoblon, 30–32%). La industria produktado altiĝis je 18% (en la plano 33–35%), la agrikultura produktado je 12% (anstataŭ la planitaj 16–18%). La realaj enspezoj de la loĝantaro kreskis nur 8%, la totala konsumado 13,5%; la komparado de tiuj ĉi du ciferoj montras, ke la loĝantaro foruzis iom ankaŭ el siaj rezervoj.

## Pliboniĝanta bilanco

La pli modera kreskado de la produktado ebligas fakte nur same moderan altigon de la vivnivelo; praktike oni celas unuavice konservi la ĝisnun atingitan nivelon. Dum la sekvaj jaroj oni deziras malpliigi la eksterajn ŝuldojn de la lando, kaj atingi pli–malpli ekvilibritan staton de eksporto kaj importo. Dum 1980 sur tiu tereno jam montriĝas belaj rezultoj: Hungario eksportis al kapitalismaj landoj (unuavice la bilanco kun tiuj landoj estas negativa) en la valoro de ĉ. 4,9 miliardoj da dolaroj, kaj la importo superis la eksporton nur ĉ. je 100 milionoj da dolaroj. Tio signifas, ke pasintjare Hungario sukcesis kompensi ĉ. 98% de sia importo. (Dum 1979 la kompenso atingis nur ĉ. 80%).

## Restrukturiĝo kaj raciigo

La bremsado de la kreskado estas nevola afero, kiun trudas al ni la cirkonstancoj de la monda ekonomio, kaj ĝi havas multajn ne agrablajn konsekvencojn, el kiuj elstaras la pli modesta altiĝado de la vivnivelo.

Sed la malpli rapida kreskado havas ankaŭ pozitivan aspekton. Nun, kiam la kvantaj pretendoj ne tiom premas la produktistojn, ili havas eblon restrukturi kaj raciigi la funkciadon de la hungara industrio. Iom post iom oni eliminas nekontentige profitigajn laborojn, reorganizas la produktan procezon por malpliigi produktokostojn ktp.

La 6-a Kvinjara Plano, kiu ampleksas la jarojn 1981–1985, havas unuavice celojn kvalitajn, kaj nur duavice kvantajn. La ĉefa celo estas pliigi la internacian konkurkapablon de la hungara ekonomio, ja nia lando daŭre bezonas tre intensan importadon de plej diversaj varoj, kaj importi daŭre eblas nur se oni samtempe sukcese eksportas.

La tasko staras antaŭ ni. Kaj la komencaj rezultoj montras, ke la lando jam estas sur la vojo solvi ĝin.

D-ro Renato Corsetti:

# Esperanto en la „tria mondo": faktoj kaj ŝancoj

Gaja Esperanta studhoro en la Budapeŝta TESCO–kolegio

**La aŭtoro estas novelektita vicprezidanto de UEA, kaj de pluraj jaroj li okupiĝas pri la disvastigo de Esperanto en la tria mondo. La ĉi-supra artikolo estis speciale verkita por HV, laŭ peto de nia redakcio.**

Estas konata vero inter esperantistoj, ke Zamenhof sukcesis vivigi sian lingvon, ĉar li komprenis la fundamentan gravecon de la rolo de la lingva komunumo, de la parolantoj de difinita lingvo rilate la destinon de la lingvo mem. Multaj esperantologoj konsentas pri tio, ke Esperanto postvivis sian iniciatinton ne pro struktura perfekteco, sed pro ekzisto de komunumo, kiu ligis al la lingvo ne-lingvajn idealojn, kaj tiu antaŭenportis la lingvon por antaŭenporti tiujn idealojn. La tuta preskaŭ centjara historio de tiu komunumo montras ĝian rezisto-kapablon kaj ĝian konkero-kapablon. Temas, kompreneble, pri paca konkerado de mensoj, kie ajn sin prezentas ŝancoj por tio. Ni plenrajte fieras pri la disvastiĝinteco de nia komunumo en miloj da urboj, kaj en dekoj da landoj; tiom pli ni rajtas fieri, se ni konsideras, ke ĝi estas rezulto nur de sindediĉo de centmiloj da homoj, kiuj laboris kaj plue laboras en tre malfacilaj kondiĉoj meze de indiferento kaj kontraŭ la potencaj faktoroj. Tio, tamen, rilatas nur al la „unua" kaj „dua" mondoj, por uzi laŭmodan, neprecizan, sed tuj efikan disdividon de nia terglobo. En la „tria mondo" nia komunumo, kaj ĝia lingvo, estas tre subreprezentata.

En la unuaj jardekoj de ĉi tiu jarcento estis apenaŭ eble paroli pri la internacia lingvo al afrikanoj, azianoj kaj parte ankaŭ al sudamerikanoj. Ili havis tiom da pli urĝaj problemoj, ili apenaŭ „ekzistis", tio estas: la kultura vivo en tiuj landoj estis tute sufokata de koloniistaj elitoj, kiuj klopodis planti tie sian metropolan kulturon. Sed en la lastaj jardekoj, post la fino de koloniismo, afrikaj, aziaj kaj sudamerikaj landoj ekaperis en la internacia scenejo, kaj komencis vivi sian memstaran vivon ankaŭ se inter ĉiuspecaj problemoj. Prave, do, ĝuste en ĉi tiu periodo la Esperanto-movado venis al analizado de la situacio de Esperanto ekster Eŭropo kaj al klopodoj por ŝanĝi tiun situacion.

Ĉi tiu agado daŭras en la ĝis-nuna formo proksimume la lastajn dek jarojn, kaj ni ekzamenos ĝin ĉi-sube post bird-okula trarigardo de la nuna pozicio de Esperanto en la priparolataj mondopartoj.

## Azio

Esperanto eniris Azion jam komence de ĉi tiu jarcento, sed ĝi enradikiĝis kaj floris nur en kelkaj landoj: Ĉinujo, Japanujo, Vjetnamujo kaj Koreujo. En tiuj landoj nun ekzistas fortaj movadoj, kiuj sukcesas kontraŭpezi la forton de la movadoj en eŭropaj landoj.

En aliaj aziaj landoj estas nur sporadaj aretoj da esperantlingvanoj, kaj en kelkaj kazoj nur malmultegaj izoluloj.

Lastatempe la movado vigliĝis en Hindujo, en Pakistano kaj en Irano. En Hindujo deko da lokaj Esperanto-grupoj estas parte fruktoj de la semoj plantitaj de sinjorino Haudebine (kiu vivis tie longajn jarojn) kaj parte rezultoj de la agadoj de entuziasmuloj aperintaj dum la lastaj jaroj.

En Pakistano ekzistas promesoplena organizaĵo, kiu sukcesis eĉ eldoni lernolibron en la urdua, kaj jam disbranĉiĝas en kelkaj lokaj grupoj. La ekapero de amas-karaktera movado en Irano antaŭ kelkaj jaroj estas ĉefe dankinda al la agado de unu homo, d-ro Saheb-Zamani, kiu kapablis utiligi sian socian prestiĝon por atingi amaskomunikilojn, universitatojn ktp Pro la progresemaj, kontraŭimperiismaj idealoj, kiujn la irana movado havis de la komenco, ĝi travivis la nacian „revolucion" post la forpelo de la ŝaĥo. Espereble la evoluo de tiu lando post la lastaj eventoj (oni militas en la momento, kiam ĉi tiu artikolo estas verkata) ebligos plifirmiĝon de Esperanto post tiom flagra starto.

## Arablingvaj landoj kaj Israelo

Pro kialoj ne tute kompreneblaj la internacia lingvo neniam renkontis grandan simpation, lernpretecon, apogojn en mezorientaj kaj nordafrikaj arablingvaj landoj. Siatempe ekzistis organizaĵoj en Maroko kaj kursoj en Egiptujo, sed temis pri faroj de eŭropanoj loĝantaj tie.

En la nuna momento ekzistas nur ne organizitaj grupetoj da esperantistoj en preskaŭ ĉiuj tiuj landoj de Jemeno al Maroko, sed ili ne sukcesas vastigi sian nombron aŭ influon al la ĉirkaŭa socio. La plej agema rondo troviĝas en Damasko kaj laboras por pretigi Esperantan–araban vortaron. Male, en Israelo ĉiam estis relative forta movado. Kompreneble ĝi estas praktike forŝlosita el kontaktoj kun esperantistoj en la najbaraj landoj.

## Afriko

Afriko el nia vidpunkto estas nur insulo norde de Malagasujo. Fakte nur en Malagasujo, danke al la agado de kelkaj francaj esperantistoj en la 30-aj jaroj, ekzistas relative vasta esperantlingva komunumo. Bedaŭrinde pro la granda distanco ĝi estas tute enfermita en si mem, kaj kiel okazas en malgrandaj fermitaj vilaĝoj oni ĉefe pasigas la tempon per internaj kvereloj. Ne pasas jaro sen fondo kaj malfondo de almenaŭ du novaj, inter si rivalaj Esperanto-organizaĵoj.

Esperojn pri eblaj evoluoj en baldaŭa estonteco sur la afrika kontinento mem donas nur landoj de la okcidenta bordo, kie agemaj individuoj kaj grupetoj persiste laboras.

## Suda Ameriko

En multaj sudamerikaj landoj vivas mult-nombraj esperantlingvaj komunumoj. Foje, laŭ nombro, la tiea movado superas tiun en pluraj okci-

denteŭropaj landoj. Ilia ĉefa problemo estas la malproksimeco de la movadaj centroj kaj la sekva manko de sento pri aparteno al tiu tutmonda movado. Malgraŭ niaj pretendoj pri solvado de ĉiuj mondaj problemoj per la internacia lingvo, ni ofte eĉ ne sukcesas solvi problemojn de interkompreniĝo kaj interproksimiĝo en la movado mem. Libroj eldonataj en Eŭropo tre malrapide kaj en ne sufiĉa kvanto atingas Brazilon aŭ Japanujon kaj inverse.

Espereble la Universala Kongreso en Brazilo helpos proksimigi la sudamerikajn esperantistojn al la alikontinentaj, kaj helpos la tutmondan movadon profiti el la talentoj, kiuj tie estas troveblaj.

## Pasinta kaj estonta agado de UEA–TEJO

Dum la lastaj jaroj la agado de la centraj instancoj de la movado baziĝis sur sistema kuraĝigo de la kernoj agantaj en triamondaj landoj. Oni korespondis kun ili, konsilis ilin, sendis al ili informan kaj instruan materialon.

Temis pri „rutina" agado, kiu montras siajn rezultojn nur en la daŭro de la tempo. Ĝi ne apartenas al tiuj agadoj, kiuj promesas „la finan venkon" dum la posta monato, nek al tiuj agadoj, kiuj celas atingi tujan kaj grandan prestiĝon por la lingvo (agnosko fare de ŝtat-prezidantoj, funkciuloj de internaciaj organizaĵoj ktp.).

Ĉio-ci kune kun sendado de lernolibroj al ĉiuj triamondaj inform-petintoj, portis kelkajn rezultojn, kvankam ankoraŭ malgrandajn kaj ne ĉiam rekte atribueblajn al tiu agado.

Ni citu nur unu ekzemplon. La Esperanto-movado en Kubo jam organiziĝis kaj espereble baldaŭ ĝi aliĝos al UEA kaj ekpartoprenos la internacian esperantlingvan vivon. Certe tio ŝuldiĝas al la favoraj cirkonstancoj en Kubo, al la laboro de kelkaj tieaj entuziasmuloj, al la favoraj reeĥoj el socialismaj landoj, kiujn ricevis kubaj registaraj instancoj okupiĝantaj pri la problemo. Sed tio parte ŝuldiĝas ankaŭ al la daŭra kontaktado de kubaj esperantistoj fare de kelkaj funkciuloj de UEA–TEJO jam de antaŭ dek jaroj. Oni sendis hispanlingvajn librojn, vortarojn, informilojn. Oni daŭre sekvis la evoluon kaj klopodis reflamigi estingiĝontan vervon, trovi la financajn rimedojn por helpi en ĉiu ebla maniero. Kaj jen finfine venas rezulto.

Same, kiam Hinda Esperanto-Asocio parados en la jarlibro, oni certe ne rajtos forgesi, ke por tio kelkaj homoj jam laboras de jardekoj.

Turnopunkto por la priparolata agado estis la kunveno pri „Regiona Agado" (tio estas la ne tuj signifomontra kod-nomo, kiun aktivuloj uzas) okazinta dum la Universala Kongreso en Stokholmo. Tie oni decidis aldoni al la „normala" respondado al informpetoj kaj alsendado de instrumaterialo al petintoj, novan pli aktivan agad-branĉon.

Esence temas pri „atako" de nur unu-du landoj en ĉiu kontinento ĉiun jaron pere de inform-kampanjoj lanĉataj el Eŭropo. Praktike oni aperigos serion de gazetaj anoncoj kaj artikoloj en la cel-landoj, kaj respondos ilin per lernolibroj kaj informiloj. Ne ĉiuj ricevontoj de tiuj lernolibroj lernos, sed ankaŭ ne ĉiuj ricevintoj de la unua tia dissendo farita de Zamenhof lernis.

Post iom da tempo, mi esperas, ke mi povos informi la legantojn de Hungara Vivo pri la rezultoj de ĉi tiu nova iniciato.

Intertempe ankaŭ la „tradicia" agado estis rearanĝita por atingi pli da efikeco. Ĝis nun nur unu komisiito faris la korespondan laboron, dum la Centra Oficejo faris la enpakan kaj sendan laboron. La mono por la tuto venis el la Fondaĵo Azio-Afriko, tio estas el donacoj de unuopaj esperantistoj en pagopovaj landoj.

Ekde nun tri homoj respondecos pri rilatoj respektive kun Azio, arablingvaj landoj kaj Afriko–Suda Ameriko. Krom la Fondaĵo Afriko-Azio, plufunkcianta en Roterdamo ĉe la Centra Oficejo, alia Fondaĵo starigita en Tokio ĉe Japana Esperanto-Instituto, sed kun partopreno de ĉiuj japanaj esperantistaj organizaĵoj liveros la financajn rimedojn. Finfine japanoj sukcesis organize konkretigi sian intereson je la disvastiĝo de Esperanto en aliaj aziaj landoj.

Ne subtaksinda, kaj ne subtaksata estas la kontribuo, kiun povas doni esperantistoj kaj esperantistaj instancoj en socialismaj landoj.

Budapeŝto jam disponigis sian pres-kapablon por kamboĝa vortaro kaj por vjetnama lernolibro. Ĉeĥa Esperanto-Asocio siatempe disponigis centojn da „Paŝoj al Plena Posedo" por triamondaj esperantistoj. Bulgara Esperantista Asocio pretas helpi kaj por la vjetnama lernolibro kaj por turklingvaj lerniloj.

Siatempe jugoslavoj ankaŭ destinis parton de la mono restinta post la Beograda kongreso al Fondaĵo Evolulandoj, kiu helpis financi eldonon de lernolibroj en kelkaj lingvoj.

Sed ekzistas ankoraŭ grandaj agad-eblecoj, ankaŭ por unuopaj esperantistoj, kiuj minimume povus sisteme korespondi kun triamondaj esperantistoj por helpi ilin eliri el sia izoleco, kaj ligi tiujn homajn rilatojn, kiuj estas la plej bona garantio pri plua restado en la movada komunumo.

Varbado de triamondaj studentoj, kiuj multas en ĉiuj socialismaj ĉefurboj, estas alia agad-kampo.

## Kaj ĉi tiu agado?

Ofte oni aŭdas kritikojn pri la koncepto mem, sur kiu baziĝas ĉi tiu tuta agado. La plej bona maniero por konvinki afrikanojn kaj azianojn – oni argumentas – estas laborado por ke Esperanto grandskale akceptiĝu en Eŭropo. Tiam aliaj kontinentoj sekvos. Ĝis nun ili ja ĉiam sekvis nin.

Certe, se morgaŭ eŭropaj registaroj decidus enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn, tio fortigus la pozicion de nia lingvo ankaŭ en aliaj mondopartoj, sed... Unuflanke ŝajnas preferinde apogiĝi sur la propraj fortoj, kiuj povas porti al pli firma progreso ol eble neniam venontaj registaraj decidoj, kaj aliflanke necesas jam konvinkiĝi ke la mondo iĝas pli plurcentra kaj ke ne necese iu antaŭiras kaj iu alia sekvas.

Esperanto estis iniciatita kiel tutmonda lingvo, kaj ĝi pluhavas ĉi tiun universalisman pretendon. Ĉi-cele iĝas pli kaj pli mallarĝaj niaj horizontoj kaj maladekvataj niaj fortoj, se ni daŭre priatentas nur la malnovajn mondopartojn. Jam nun ĉiuj internaciaj organizaĵoj (UNO, Unesko ktp.) havas pli larĝan membro-bazon ol nia UEA, kaj tio estas tre dangera signo.

Ĉu ekzistas sukcesoŝancoj por tia agado? Ĉu ni, kiuj malsukcesas disvastigi Esperanton en, ekzemple, Svisujo, povas sukcesi en Nepalo?

Kun ĉiuj eblaj limigoj, mi tamen respondas, ke *jes*. Niaj ĉefaj aliancanoj en tiuj landoj estas la „freŝeco" la manko de antaŭjuĝoj, la lernemo, la sincera deziro je progreso de la tieaj homoj.

Ni ne forgesu, ke similaj faktoroj estis tiuj, kiuj permesis la ekeston de nia movado fine de la pasinta jarcento en Eŭropo inter la laborista kaj etburĝa tavoloj de la tiamaj socioj.

**Baldur Ragnarsson**

# Pri la Esperanta kulturo

**La ĉi-supra artikolo estas parto de cirkulero, kiun Baldur *Ragnarsson*, nova vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo de UEA dissendis al diversaj funkciuloj de la Asocio. La Redakcio de HV trovis tamen, ke tiu ĉi nepre profunda kaj tre interesa aliro de la koncepto „Esperanto-kulturo" meritas la atenton de la pli vasta publiko, kaj tial – kun la afabla konsento de s-ro Ragnarsson – ni aperigas la plej interesajn ĉapitrojn de la cirkulero. (La subtitoloj estas konceptitaj fare de la redakcio.) (S-ro Ragnarsson volonte ricevus komentojn de niaj legantoj. Lia adreso: Sogavegur 170, 108, Reykjavik, Islando.)**

...Kiel devas evidentiĝi el la sekvanta teksto, per la vorto „kulturo" mi *ne* celas tian komprenon, eventuale argumenteblan surbaze de sociologia (strukturisma) analizo de la Esperanto-movado, ke jam estas konstatebla ia Esperanta „subkulturo", konsistanta el tuta komplekso de apartaj sintenoj, valoroj kaj kutimoj komunaj al la membroj de la t.n. „Esperanta socio", kiu tiel apartiĝas de la ceteraj kulturaj kaj subkulturaj medioj en la mondo. Tre eble la tendencoj al formiĝo de „Esperanto-subkulturo" estas fortaj: ni havas ekz-e niajn nociojn de universalismo, sennacieco, neŭtraleco, niajn simbolojn kaj kantojn, eĉ „mitojn", kiuj pli-malpli efikas al certa subkultura formiĝo interne de societoj kaj pli grandaj organizoj kaj en iliaj interagadoj. Per la vortoj „kulturo" kaj „kulturpolitiko" mi ne celas tian kulturan apartiĝon de la Esperanto-movado, sed male, kulturan elcentriĝon al ĉiam pli vasta partopreno kaj influado en la formiĝo de mondskala kulturo de interliga enhavo en komune homara senco. Eĉ la kutima divido de kulturo en du aspektojn, la „altan" kaj la „popularan", ne multe utilas ĉi tie; tiaj terminoj havas signifojn relativajn, kiuj ne proponas fidindan gvidon en unu aŭ alian direkton.

Kulturan situacion kaj staton estas ĉiam malfacile taksi pro la subjektiveco de kriterioj kaj la komplikeco kaj subtileco de la efektivaĵo mem. Kutime oni tamen povas havi ĝeneralan impreson pri iu certa kultura situacio kaj stato. La stato decidiĝas de la situacio, de la kondiĉoj kaj cirkonstancoj, en kiuj troviĝas la kultura agado je difinita tempo. Kiaj estas tiuj kondiĉoj, tiuj cirkonstancoj en la Movado en la nuna momento? Kaj kiuj estas la faktoroj, kiuj decidas pri la situacio?

Evidente, ni ĉi tie staras antaŭ malsimpla, sociologia komplekso. Ĝi ampleksas i.a. la efektivan nombron de

**Sceno el grandsukcesa teatra vespero de la 62 UK en Rejkjaviko**

aktivaj esperantistoj tra la tuta mondo, ilian distribuitecon, ilian socian konsiston. Ĝi ampleksas ĉian Esperanto-kulturan agadon de la esperantistoj, de individuoj, grupoj kaj pli grandaj organizoj. Ĝi ampleksas la eldonejojn, la propagandon por la lingvo kaj ĝiaj atingoj, kaj ĉiajn rendevuojn, kunvenojn kaj kongresojn, grandajn kaj malgrandajn. La elnombrado de la situacikreaj faktoroj apenaŭ havas finon.

## Necesas pli da kunlaboro

Tamen, la situacio ŝajnas ĉiam barakti sur la nivelo de nura ekzisto, kvankam la efektivoj kaj latentoj de niaj fortoj ja sufiĉas por pli kontentigaj atingoj. Mankas pli da kunlaboro, pli da kunordigita funkciado. Ni ja ankoraŭ trovas nin sur tia stadio, kiu postulas zorgan koncentradon de nia kultura agado.

Estas unu el la plej gravaj devoj de UEA iniciati novajn ideojn kaj iliajn plenumojn sur la tereno de nia kulturo. Jam nun pli-malpli funkcias diversaj formoj de ĝia kultura agado. La ĉi-jara Jarlibro de UEA listigas kiel tiajn i.a. la Belartajn Konkursojn, la Internacian Ekzamenon, la Korespondan Servon Mondskalan, la Lingvan servon, la Magnetofonan servon. Kompreneble ankaŭ la okazigoj de la Universalaj Kongresoj ĉiujare, eldonado de libroj kaj revuoj, la Libroservo, estas gravegaj kulturaj kontribuoj fare de UEA. Tamen, certe la funkciado de iuj el la menciitaj aranĝoj kaj servoj povus esti pli efika. Mi menciu ekzemple la Belartajn Konkursojn, ĉar mi intime konas tie la situacion. Ne estas dubo pri tio, ke almenaŭ enkadre de la Kongresoj BK ricevis kreskantan atenton en la lastaj jaroj. Kritikinda manko tamen estas, ekzemple, ke premiitaj verkoj (escepte de poemoj) ne plu aperas en la revuo de UEA, kaj apenaŭ aliloke. Alia ekzemplo estas la Internacia Ekzameno, kiu praktike ne funkciis en la lastaj jaroj. Ĝiaj altgradaj postuloj probable estas tro severaj por servi instige al partopreno el inter la ĝenerala publiko; supozeble ankaŭ mezgrada ekzameno devus esti aranĝita por plifunkciigi aktivan ekzamenan servon.

Kompreneble, kulturaj iniciatoj okazadas ankaŭ sendepende de UEA. Efektive, iuj el tiaj iniciatoj estas inter la plej promesplenaj esplorfrontoj en la Esperanto-movado. Naciskalaj artaj entreprenoj, kiel OPERA–77 kaj –79 en Pollando, kaj la agadoj ĉirkaŭ kulturaj centroj kiel KCE (Kultura Cent-

ro Esperantista) en La Chaux-de-Fonds, meritas atenton de la internacia movado; pristudo de iliaj spertoj kaj atingoj povus multon kontribui al profundigo de kompreno pri nia kultura situacio kaj niaj kulturagadaj eblecoj.

## Esperanto-movado estas kulturmovado

La Esperanto-movado estas esence kultura fenomeno kun kulturaj celoj. Tio validas kaj pri la ĝenerala agado de UEA kaj aliaj Esperantaj organizoj, kiuj laboras por la enkonduko de Esperanto kiel vaste funkcianta internacia lingvo, kaj pri la agado de unuopaj neorganizitaj esperantistoj, kiuj partoprenas la laborojn de la ĝenerala movado nur nerekte, pere de verkado, tradukado aŭ simpla sporada aĉeto kaj lego de libroj kaj revuoj. Lingvo kaj kulturo estas interdependaj fenomenoj; lingva movado nutriĝas el kulturo, transformas valorojn kaj generas novajn.

En la kazo de la Esperanto-movado la unue menciita faktoro, *kultura nutriĝo*, ĉiam estis la plej substanca ingredienco. La koncepto – kiu striktasence implicas pasivecon – konstatas la fakton, ke la uzantoj de Esperanto ĉiam estis nature influataj de siaj propraj nacilingvaj kulturoj, imitis iliajn formojn kaj enhavajn valorojn en sia pensado kaj esprimado de Esperanto, transprenis iliajn kriteriojn, kaj, je pli aktiva stadio, *transformis* iliajn apartajn karakterojn al vastetenda utiligo en internacia kadro.

## Nutriĝi el ĉiuj lingvaj kulturoj de la mondo

Ekzemploj de tia kultura nutriĝo kaj tia transformado troviĝas je ĉiu paŝo en la evoluo de nia konkreta historio. Tial sufiĉu, ke mi prenu nur unu klarigan ekzemplon. Kiam la „Parnasa Gvidlibro" parolas pri ia „denaska" metriko de la Esperanta poezio, ĝi simple celas piednombran metrikon laŭ la klasika modelo, kiel ĝi estis aplikata en la okcidentaj literaturoj dum la lastaj jardekoj. Tial, fakte, ne temas pri aŭtonoma kreo de Esperanta metriko, sed pri imito kaj transpreno. Io tia estis ja tute natura kaj atendebla en la tiutempaj cirkonstancoj, kaj ja daŭre estas kaj estos. La Esperanta kulturo estas en la unika pozicio *nutriĝi* aŭ *esti nutrata* el (teorie) ĉiuj lingvaj kulturoj de la mondo, ekzistantaj kaj ekzistintaj. El tiu multvaria nutrado ĝi kreskas kaj evoluas, kaj direktiĝas al plia aktivo en novaj sintezaj manieroj kaj aperoformoj. Kaj estas ĝuste sur tiu ĉi lasta stadio, kiam esenca novo ekkreskas el malnovo, ke oni povas paroli pri apero de aŭtonoma Esperanta kulturo kaj la *genera proceso* komenciĝas.

La Pola Esperanto-Teatro jam konkeris Esperantujon

Bulgara Esperanto-Teatro estas konstanta partoprenanto de Universalaj Kongresoj

La *kultura generado* per Esperanto do prenas stimulon el transformoj de nacikulturaj valoroj en la esperanto-kulturan subtavolon. Proceso de pasivo pretigas la grundon por agado de aktivo. Sed tio tamen ne estas la sola efikoforto. La alia estas ne malpli grava, la lingvo mem. Ĉi tie ne estas la loko por detala pritrakto de la *lingva spirito* en Esperanto. Sed ni ĉiuj ja bone scias, ke Esperanto ne estas ia konversacia sistemo de simboloj, destinita por ekskluzive praktikaj celoj. Ĝi pruviĝis multe pli mirinda instrumento de la homa pensado ol ĝiaj unuaj proparolantoj povis iam antaŭvidi. Iom post iom ĝiaj verkistoj kaj lingvistoj evidentigas ĝiajn latentojn per siaj eksperimentoj kaj esploroj. Tiuj latentoj kaj ellatentigitaj povoj de la lingvo konsistigas la duan efikoforton en la kultura generado. Estas ĝuste tiuj povoj, kiuj ludas la plej gravan rolon en la jam menciita transformado de alprenitaj kulturvaloroj. Kaj estas ankaŭ tiuj samaj povoj, kiuj ebligas *esence originalan generadon* de novaj kulturvaloroj en Esperanto. Iliaj efikoj ĝis nun estas plej klare konstateblaj sur la kampo de nia originala literaturo. Sed ili sin manifestas ankaŭ sur aliaj kampoj, kiel en paroladoj kaj la konversacia lingvo, kiu nun rapide disvolviĝas.

## Pri nia kulturpolitiko

Mi opinias, ke prova difino de nia kulturpolitiko devas baziĝi sur agnosko kaj konsidero de tiuj tri esencaj faktoroj, la nutriĝa, la transforma kaj la genera, kaj kiel ili interefike konstruas komplekson de funkcio, kiu dinamike ebligas ĉian esprimadon postulatan de persona kaj ĝenerala reprezentantoj kaj rilatoj. Sur tia bazo eblas disvolvi tendencojn, direktojn kaj celojn sufiĉe inkluzivajn por riĉe varia kulturiĝo, kiun la esperantistoj povas fidi, subteni kaj progresigi sen ia embaraso de malsupereco. Kio plej gravas estas ĝuste tio, ke la esperantistoj akiru plenan fidon pri sia lingvo kaj ĝia povo subporti novan kulturon, kiu ne estas ia duplikato de iu aŭ tiu nacilingva kultura komplekso – ekzemple la okcident-eŭropa – sed memstariĝema sintezo de diversaj kaj malsimilaj lingvokulturoj celanta aŭtentike internacian kulturon de nova speco, kiu kapablas liberigi la homan spiriton el ĉiaj nur-teritoriaj limoj de konscio.

## Regionoj de Hungario



# Departemento Hajdú-Bihar

Ĝi situas sur la orienta parto de la lando. El inter la departementoj de Hungario ĝi estas la kvara laŭ areo (6212 km$^2$), kaj laŭ la nombro de la loĝantaro (530.000) ĝi estas la kvina.

Ĝia tuta tereno etendiĝas sur la Hungara Ebenaĵo. Ĝi estas malalta ebeno, kies alteco nenie atingas 200 m-jn super la marnivelo.

La nomo „Hajdu" (hajduko) devenas el la 16-a jarcento, kaj ĝi estas la kolektiva nomo de komunumo – estiĝinta dank' al diversaj sociaj kaj politikaj cirkonstancoj – kies membroj speciale grandnombre partoprenis jen la sendependigajn batalojn kontraŭ la Habsburga regado, jen por defendi la landon kontraŭ la turka konkero.

La ĉefa urbo de la departemento estas *Debrecen*. Laŭ grandeco ĝi estas la tria urbo de Hungario, tradicia centro ekonomia kaj kultura de la Transtisaj teritorioj.

La radikoj de la malnova Debrecen reetendiĝas ĝis la 12-a jarcento. Ekde tre malnovaj tempoj ĝi fariĝis grava loko de internacia komerco. En la mezepoko – kaj precipe post la reformacio – ĝi fariĝis ankaŭ kultura kaj religia centro. Ĉi tie disvolviĝis la Hungarlanda reformacio, pro kio Debrecen estis nomata „Kalvinana Romo". Tiutempe la origine komerca urbo fariĝis agrarkaraktera.

Dum la liberbatalo 1848/49 Debrecen estis kelktempe ĉefurbo de la lando. Ankaŭ vintre de 1944/45 ĉi tie formiĝis la Provizora Parlamento kaj la registaro; tiel Debrecen fariĝis denove por mallonga tempo ĉefurbo de la lando. Dum la postaj jaroj komenciĝis grandskala industriigo, kaj nuntempe Debrecen ne plu estas agrara urbo.

La malnova universitato disbranĉiĝis kaj hodiaŭ Debrecen havas tri universitatojn kaj kvar altlernejojn. Malnova institucio, havanta historian pasinton estas la Kolegio, kiu entenas Kalvinanan teologian akademion kaj Kalvinanan gimnazion.

Tipa pejzaĝo de la departemento estas *Hortobágy*. La 115 km$^2$-jn granda ebena stepo estis dum longa tempo ekzotika vidindaĵo de la Eŭropa fremdultrafiko. Kvankam en la lastaj jardekoj unu parton de Hortobágy oni komencis moderne kulturi, tamen ĝi multe konservis el la iama romantikeco.

Por defendi la naturajn valorojn de Hortobágy, la Tutlanda Naturprotekta Oficejo en 1973 deklaris konsiderindan parton de la stepo Nacia Parko. Al ĝiaj fremdultrafikaj vidindaĵoj apartenas la t.n. „Naŭ-trua ponto" kaj la Ĉardo de Hortobágy.

La urbo *Hajdúböszörmény*, havanta 32.000 enloĝantojn, estas unu el la riĉaj urboj historiaj, kun multnombraj memoraĵoj de la „hajduko-tradicioj". En la iama barokstila rezidejo de la hajduk-kapitano nuntempe estas videblaj la urbohistoriaj kaj arkaikaj memoraĵoj de la Hajduk-Muzeo.

*Hajdúszoboszló* estas unu el la plej konsiderindaj kuracbanejoj ne nur de la departemento, sed ankaŭ de la

**La centro de Debrecen; dekstre la Urbodomo, en la fono la „Granda Preĝejo" Kalvinana**

**La Teatro Csokonai en Debrecen**

**György Lázár, ministro-prezidanto vizitas la Nuklean Esplor-instituton en Debrecen. En la analitika laboratorio de la instituto.**

**László Gereblyés**

**Konfeso al Hungario**

*Kiam vi ŝajnis falsa, vanta*
*eĉ tiam*
*kiam vi estis min mokanta*
*eĉ tiam*
*kiam vi min en ĉelo tenis*
*eĉ tiam*
*kiam vi mian sangon prenis*
*eĉ tiam*
*kiam vi sur min ŝtonojn ĵetis*
*eĉ tiam*
*kiam vi al mi vangen tretis*
*eĉ tiam*
*kiam vi min en forojn pelis*
*eĉ tiam*
*kiam vi min jam nulforgesis*
*eĉ tiam*
*mi vin ĉirkaŭbrakis*
*kiel dioj agis*
*en imago*
*kaj pli honteme ol adoleska knabo*

Parizo, majo 1945.

El la hungara: Imre *Szabó*

tuta lando. La banejo ekfunkciis en la 30-aj jaroj. La 36-38 C° akvo estas speciale taŭga por kuracado de inflamoj, nervodoloroj, reŭmatismo kaj pluraj haŭtmalsanoj, ĝi utilas ankaŭ kontraŭ stomak- kaj reno-malsanoj.

*Hajdúdorog* estas la centro de la Hungarlanda grekkatolika eklezio, kun episkopa rezidejo. Ĝia mezepok-devena preĝejo estas valora artobjekto.

*Hajdúnánás* estas urbeto, kies 65 C° gradan termoakvon oni utiligas por kuracado de reŭmatismaj malsanuloj.

Apud *Téglás* situas protektata tereno, kiu estas fama pri sia speciala faŭno kaj flaŭro. Ĉi tie oni antaŭ nelonge malkovris restaĵojn de vilaĝo el la 9-a jarcento.

La Esperanto-movado en la departemento havas riĉajn tradiciojn. En Debrecen jam en 1906 fondiĝis E-grupo. Dekomence multaj lernis la lingvon individue kaj en la 1920-aj jaroj jam plurloke funkciis E-rondoj.

La unua vortaro Esperanta-Hungara aperis en Debrecen, en la jaro 1910, redaktita de profesoro Péter *Török*.

En 1959 oni aranĝis en Debrecen la Unuan Orient-Hungarlandan Esperantistan Renkontiĝon. Konsiderindaj eventoj okazis ankaŭ en 1966, kiam Debrecen gastigis la antaŭkongreson de la 51-a UK, kaj samtempe la kongreson de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia).

Sur la teritorio de la departemento hodiaŭ funkcias 7 Esperanto-grupoj, el tiuj 4 en Debrecen kaj po unu en Téglás, Derecske, Hajdúböszörmény. Krom la grupoj apartenantaj al la Departementa E-Komitato funkcias en Debrecen la Fervojista E-Fakgrupo kun ĉ. 150 anoj.

Instruado de Esperanto okazas regule en la Debrecena Altlernejo por Instruistoj, krome en kelkaj gimnazioj kaj ĝeneralaj lernejoj, kaj en Debrecen, kaj en Téglás.

De jaro al jaro pliiĝas la nombro de tiuj, kiuj faras bazgradan (A) kaj la instruistan (C) ekzamenon. Por la junularo oni ofte aranĝas E-lingvajn konkursojn.

István *László*

**Ĉiujare evoluas kaj populariĝas la kuracbanejo Hajdúszoboszló**

István Torda

# Jarcentoj de la hungara literaturo

## 12. Popolaj verkistoj

zodoj. Ili informas la leganton pri la vivo de loĝantoj en grandbieno de aristokrato. La dua verko, *Petőfi*, estas unu el la plej belaj volumoj pri la granda poeto. Ĝi estas samtempe eseo, biografio, analizaro de verkoj kaj subjektiva konfeso. Tralaborita varianto de tiu verko sub la titolo *Sándor Petőfi* aperis en 1962.

Gyula Illyés kun granda ĝojo salutis la liberiĝon desub la faŝisma regado, kaj la disdividon de la grandbienoj. En raportaĵoj li jubile parolis pri la rekonstruado, pri la hungara kampulo, komencanta novan vivon. Post 1949 unu post la alia naskiĝis Illyés-aj dramoj. *Ekzemplo de Ozora* (1952) kaj *Torĉlumo* (1953) revivigas la epokon de la revolucia liberbatalo de 1848–1849. *Georgo Dózsa* (1954) surscenigas la hungaran kampular-ribelon de 1514, la *Muelejo ĉe Rivero Séd* (1960) la tragikan jaron 1944. La dramoj *Favorato* kaj *Strangulo* (1963) revokas la figuron de interesega hungara politikisto kaj verkisto pasintjarcenta, László Teleki. La unua estas tralaboraĵo de tragedio de li verkita, la dua estas historia dramo pri liaj vivo kaj morto. Alia dramaĵo de Illyés, *Puruloj* (1969) estas tragedio, reviviganta la historion pri pereo de la albigensoj – Provencaj sektanoj de la 14-a jc. – kun escepta forto. En la ese-romano *En la Boato de Kharono* (1969) la aŭtoro skizas simptomojn de la maljuniĝo, krome ankaŭ en lia poezio plimultiĝis lastatempe versaĵoj pri la luktado kun la maljuneco.

### Romanistoj

La plej karakteriza ano de la malriĉkampula flanko de la „popolverkista" movado, samtempe ĝia plej fekunda prozisto kaj publicisto estis Péter *Veres* (vereŝ) (1897–1970). Li debutis per prozaj poemoj kaj aŭtobiografieskaj verkoj, kiel *Raporto* (1937), *Herbejrando* (1940), kiuj la unuan fojon priskribis aŭtentike la luktoplenan vivon de la kampul-proletoj de la Hungara Ebeno.

Ekde 1945 Péter Veres multajn jarojn agadis kiel aktiva politikisto, nur post 1949 li revenis al la literatura verkado. En la noveloj de la volumo *Priprovo* (1950) li desegnis novajn tipojn de la vilaĝo, komencanta kolektivan vivon. Rakontoj de la novelaro *Pomarbejo* (1954) tuŝis problemojn de la nova moralo, tiujn de la venintoj el la vilaĝoj al la urboj. Veres verkis malongajn romanojn, sed trovis ankaŭ la eblon por krei romanecan aŭtobiografion en trilogio *Tri generacioj* (1950–1957).

**Sceno el la dramo „Torĉlumo" de Illyés**

Alia fama verkisto de la „popolula maldekstro" estis Pál *Szabó* (sabo) (1893–1970). Veres elstaris el la detala faktomontrado, Szabó en la vigla, interesokapta rakontado, lirismo, trovebla en ĉiu parto de lia verkaro. Ĉefverko de lia unua periodo estis la trirealismaj romanoj kun profunda psikoanalizo. La romano *Funebro* (1935) montras labirinton de la vilaĝa moralo, ĝiajn rigorajn leĝojn, parencajn kun la mondo de la antikvaj tragedioj grekaj. *Peko* (1936) sugestis pri malebleco de interkompreniĝo inter intelektuloj kaj kampuloj. La verkisto publikigis siajn plej sukcesajn romanojn post 1945. *Naŭzo* (1947) estas konfeso de virino frigida, ĝi estas ĉefverko de la majstra komponado kaj tiu de la eminenta psikoanalizo. *Eszter Égető* (1956) donas skizon de la pasintaj jardekoj pere de la historio de tri generacioj de unu familio.

En siaj historiaj dramoj (*Galilei, Hus, Jozefo la 2-a, Gregoro la 7-a, István Széchenyi, La du Bolyai-oj*) László Németh prezentas rilatojn inter la individuoj kaj fortoj, formantaj la historion. En la fokuso de Németh-aj sociaj dramoj (*Ĉe fulmotondro, Cseresnyés* ktp.) staras intelektuloj, reprezentantaj ideojn de iu aŭ aliaj vivperiodo de la aŭtoro. Ili preskaŭ ĉiam fiaskas pro nerealigeblo de sia utopieco, pro deprimaj cirkonstancoj familiaj, pro la „monstreco" de la propra karaktero.

### De «la popolo de la stepkortoj» al la mondliteraturo

Elstara reprezentanto de la nuntempa literaturo hungara estas Gyula *Illyés* (ijjeŝ) (1902–). Liaj prauloj estis senagraj kampuloj kaj ŝafistoj. La familio povis edukigi lin nur je kosto de grandaj oferoj. En 1919 dum la Konsilia Respubliko la juna Illyés iĝis ruĝarmeano, post la malvenko li elmigris Parizon. Tie li kontaktiĝis kun la laborista movado kaj amikiĝis kun Tristan *Tzara*, Louis *Aragon*, Paul *Eluard*, André *Breton* kaj kun aliaj. La verkista kariero de Illyés ekis per eksperimentoj superrealismaj kaj esprimismaj.

En 1926 li revenis hejmen kaj baldaŭ iĝis unu el la plej aprecataj junaj verkistoj de la revuo „Nyugat". Liaj unuaj poemaroj – *Peza Tero* (1928), *Fojno-strioj* (1930) – plendis pro la vilaĝaj malriĉuloj en senbordaj prozaj poemoj. En la komenco de la 30-aj jaroj Illyés unu post la alia publikigis poemojn epikajn: *Tri Maljunuloj* (1931), *Juneco* (1932), *Mi Parolas pri Herooj* (1933). Ilia plej granda merito estas harmoniigo de la Eŭropa kulturo kun la kampulaj tradicioj hungaraj.

En la radikala periodo de la popolverkista movado naskiĝis elstaraj verkoj de Illyés: poemaro *Ordo en Ruinoj* (1937), raport-serio *Ruslando* (1935). Liaj du plej elstaraj prozaj verkoj estas *La Popolo de la Stepkortoj* kaj *Petőfi* (ambaŭ en 1936). La unua estas sociologiaĵo, en kiu kuniĝas aŭtobiografiaj elementoj, prihistoria analizo, priskriboj de pejzaĝoj kaj ekscitaj epi-

La „popolverkista" movado ekis post 1930, sed ĝiaj antaŭaĵoj troveblas en la 20-aj jaroj. Tiutempe havis la plej grandan influon la verkado de unu el la karakterizaj verkistoj de la kontraŭrevolucia Hungarlando, tiu de Dezső *Szabó* (sabo) (1879–1945). En siaj

studoj, en esprimismaj romanoj, plenaj je vort-torentoj – el ili la plej populara estis *La Fortrenita Vilaĝo* (1919) – li pentris per ega energio tute torditan bildon pri la hungara realo. Li estis samtempe kontraŭkapitalisma kaj kontraŭsocialisma; la soivon de la problemoj li atendis de refreŝiĝo de la hungara intelektuaro fare de praforto kampula. Post kelkaj jaroj li turnis sian rasteorion kontraŭ la germanoj, per rabieska furiozo atakante la german-faŝisman influon.

De post 1932 la „popolverkista" movado organiziĝis je tendaro. Ĝi atingis sian kulminon post 1935. Tiutempe plifortiĝis ĝiaj kontraŭfaŝismaj tendencoj, tiam naskiĝis la plej bonaj verkoj de ĝiaj anoj – parte beletraĵoj, parte sociografaĵoj, montrantaj la staton de la lando, ĉefe tiun de la kampularo. En la movado la dekstran flankon profundaj antagonsimoj apartigis disde la maldekstra, tamen la „popoluloj" ĝenerale estas karakterizeblaj per iluzio pri specifa vojo hungara en la batalo inter imperiismo kaj socialismo. Granda merito de tiuj ĉi verkistoj estas, ke ili direktis la atenton de la legantaro al la sociaj problemoj de la kampuloj, al la anakronismo de la grandbiena sistemo, krome ke ili kun grandaj energio kaj kuraĝo batalis por siaj ideoj.

## La ideologo

La movada ideologo kaj elstara personeco de la „popoluloj" estis László *Németh* (nemet) (1901–1975). Akso de lia pensaro estis kultur-ideologio, bazita sur filozofio raciisma. Ĝi estas parenco de teorioj fare de Oswald *Spengler* kaj José *Ortega y Gasset*. La socia programo de Németh nomatas „kvalit-socialismo", laŭ kiu la hungara socio devus transformiĝi libera asocio de etprodukistoj. La artikoloj, eseoj, libroj de László Németh fariĝis interesaj pro liaj grandioza erudicio, bildriĉa stilo, subjektiveca ardo. En la verkoj alternadas asertoj validaj eĉ nuntempe kun eraraj ideoj, prezentitaj ambaŭ per unikaj patoso kaj konvinkiĝo pri la alvokiteco de la aŭtoro.

La beletra verkado de Németh estas same multflanka. Li publikigis aŭtobiografiojn kaj aŭtobiografiajn fragmentojn, karakterizitajn de senindulga sincero kaj ekstrema subjektiveco. Liaj romanoj pentras precipe portreton de la intelektuaro kaj etburĝaro de la epoko inter la du mondmilitoj. Ili estas verkitaj per tekniko de la grandaj logio *Geedziĝfesto – Bapto – Lulilo* (1941–1943), roman-epopeo de la malriĉaj kampuloj, batalantaj por la

**Gyula Illyés kaj Péter Veres**



**Áron Tamási kaj Ferenc Juhász**



**Tibor Déry kaj László Németh**

agro. (Laŭ ĝi en 1948 estis farita unu el la plej sukcesaj hungaraj filmoj.) El la periodo depost 1945 de Pál Szabó la plej interesa verko estas la aŭtobiografia serio *Maltrankvila Vivo* (1955–1958).

La verkado de János *Kodolányi* (kodolanji) (1899–1969) estis proksima al la senindulga naturalismo. Lia plej granda travivaĵo estis rompo de la burĝa kaj kampula mondoj, superregado de karakterdeformiĝoj kaj pasioj pro la monavido. En la unuaj verkoj – *La Bela Suzinjo* (1924), *Mallumo* (1933) – li montris tiun mondon per senekzempla akrevido. En la 30-aj jaroj Kodolányi pli kaj pli infektiĝis pri naciismaj ideoj. Li fuĝis al la historio: unue al la hungara mezepoko, poste eĉ pli malproksimen. Li priromanis la orientajn mitojn pri la diluvo. En tiuj verkoj abundas la pompaj detaloj. Post 1945 iom longe li silentis, nur ekde 1957 li denove aperigis siajn malnovajn romanojn, pli poste publikigis novan romanon, titolitan *Akvodividejo* (1960). En ĝi li rakontas pri sia junaĝo, pentrante multnuancan bildon pri Sud-Hungario, de la jaroj post 1919.

Áron *Tamási* (tamaŝi) (1897-1966) naskiĝis en Transilvanio (nuntempe Rumanio). Li apartenis al la tie vivanta hungarlingva gento, li estis sikulo (székely). En ĉiu lia verko senteblas sagaca pensmaniero, karakteriza por liaj sampatrianoj. Li uzas ankaŭ esprimojn de tiuj homoj. Ĉe Tamási intermiksiĝas elementoj de popolfabeloj, popolbaladoj, Kristana mitologio kaj popolaj mitoj, lirismo kaj humuro. Kaj ĉio ĉi troveblas en Tamási-verkoj kun pli kaj pli polurita stilo. Li verkis novelojn, dramojn, romanojn. El lia verkaro tamen elstaras la trilogio *Ábel (Ábel en Arbaro, Ábel en la Urbo, Ábel en Ameriko* –1932–1934). La romanoj rakontas pri gaja, sikula lerta knabo, kiun en la mondo renkontas ĉiam novaj aventuroj.

El la hungara: P.A. *Rados*

# CT 451 · COLORION '81



ORION TV RADIO

Ŝaltado per tuŝo, sensora aŭtomata sistemo, per kiu ok dissendstacioj estas antaŭprogrameblaj

Rapida ekfunkcio post ŝalto

Kontaktilo por kapaŭdiloj kaj magnetofono

Ekonomia energiokonsumado

51 centimetra ekrano IN-LINE

Egale taŭgas por ricevi programojn de sistemoj PAL kaj SECAM

Aliajn gravajn teknikajn indikojn vidu en speciala tabelo

# Vladimir Szabó

Pasintjare oni povis vidi en Budapeŝto grandajn ekspoziciojn el la verkaro de maljunaj hungaraj majstroj: Károly *Koffán*, Lajos *Szalay*, Gyula *Hincz* kaj Vladimir *Szabó*. Se Lajos *Szalay* (prezentita en nia antaŭa numero) estas *la* grafikisto, Vladimir *Szabó* estas *la* pentristo, kiu havas nun en Hungario eble la plej multajn adeptojn, kies bildoj troveblas en la plej multaj ŝatataj muzeoj kaj privataj kolektoj.

Li naskiĝis en 1905, kaj fininte la belartan akademion li lernis kaj laboris en Romo (1930–1934), Parizo (1959–1961), sed lia stilo apenaŭ ŝanĝiĝis, nur riĉiĝis liaj esprimmanieroj en grafikaĵoj, pentraĵoj, kiuj spegulis pli kaj pli forte lian individuan talenton, suverenan mondon.

La arto de Szabó estas eksterordinara, fabela. Fraŭlinoj kaj virinoj, belegaj kaj malbelaj, turpaj, oldaj viroj kaj virinoj, vestitaj ne laŭ nuntempa modo, kaj en ĉiuj bildoj kune, ke la rigardanto frostotremetas vidante la ekstremajn manifestiĝojn de homo. Junaj kaj maljunaj homoj sur la stratoj de la vilaĝoj, urboj, virinoj en sukeraĵejoj, sub la karnavala ĉielo, kaj tre ofte en artlaborejo. Jen kelkaj el liaj bildtitoloj: *Maljuna urbo, Pentristo kaj modeloj, Artlaborejo ĉe la fino de lastjarcento, Subakviĝinta katedralo, Almozulo, Antikvaĵisto, Muziko en artlaborejo, Soleca pentristo, Fabeloj de Hoffmann, Geedzoj en la lumo de*

**Fabeloj de Hoffmann**





**Memportreto**

*Luno, Aŭroro de karnavalo, Malnova sukeraĵejo, Katoj kaj amikinoj, Artistoj.*

Kial li inklinas al ĉi tiuj ne ĉiutagaj vestaĵoj, ejoj, groteskaj figuroj, al la kurioza, komika, tamen dolĉa, sorĉa atmosfero?

Szabó estas artisto, do li havas senteman animon, impresiĝeman spiriton, tial vivas en lia „memorbanko" homoj kaj scenoj, okazaĵoj ankaŭ el la komenco de nia jarcento kaj el la nunaj tagoj, ĉar por li la tuta ekzistado estas senlima ebleco kaj forfluganta momento.

Li ŝatas desegni, pentri sian memportreton, kaj plej ofte li estas nur unu el la flankaj figuroj. Kiuj konas lin persone, tiuj scias: la pentristo en artlaborejoj inter belegaj, nudaj modelinoj kaj disĉiploj ĉiam estas li mem. Sur siaj bildoj li troveblas ĉiam inter multaj homoj – sed en la vivo ankaŭ li estas soleca. Szabó ŝatas la homojn, ja eble li ne scius verki eĉ unu skizon sen ili, la naturo, la kolorriĉa pejzaĝo interesas lin nur kiel scenejo, tamen – kial li estas soleca?

Verŝajne tial, ĉar li havas amason da spertoj, kaj li scias ĉion vere gravan pri la historio de la homaro. Eble tial, ĉar la homoj estas junaj – maljunaj, bonaj – teruraj, sentaŭguloj – geniuloj, sanktuloj – murdistoj. Jes, ĉi tiuj multvizaĝaj, multanimaj homoj rolas en ĉiuj pentraĵoj kaj desegnaĵoj de Vladimir Szabó. Mi pensas, ke ĝuste tial oni preferas, ŝategas lian arton, lian neforgeseblan, magian Fabellandon.

Mihály *Gergely*

# PANORAMO

**Sceno el la „Cigana barono" de la prezentado en Szeged**

## 16 prezentadoj en la ĉisomeraj subĉielaj ludoj de Szeged

De la 18-a de julio ĝis la 20-a de aŭgusto la aranĝantoj 16-foje atendas la spektantojn al la scenejo sur la placo Dóm en Szeged. La ĉijara sezono komenciĝas per la opero Ivan Susanjin de Glinka kun la kontribuo de artistoj de la Teatro Bolŝoj el Moskvo. La titolrolon kantos la fama operkantisto Jevgenij Nesterenko. La plej populara el la nuna serio de prezentaĵoj sendube estas la Cigan-barono de Strauss, kiu dufoje estos prezentata, sed jam anticipe (en februaro! ) ĉiuj biletoj elĉerpiĝis por ambaŭ vesperoj. Grandajn eventojn promesas la prezentado de la dramo Vilhelmo Tell de Schiller sur la subĉiela scenejo kaj ankaŭ tiu de la baleto Spartacus de Haĉaturjan, prezentota de la baletensemblo de la Hungara Ŝtata Operejo.

## Premio en Parizo

La Hungara Diskoprodukta Entrepreno ricevis en Parizo la premion „Ora Orfeo" laŭ la juĝo de internacia ĵurio por la surdiskigo de la komponaĵo de Haydn: La sep vortoj de Jesuo sur la kruco. János Ferencsik, internacie konata dirigento transprenis la premion ankaŭ je la nomo de la gesolistoj kaj la orkestro, partoprenintaj la laboron. Ĉi tiu komponaĵo de Haydn ne estas vaste konata kaj apenaŭ estas prezentata en koncertejoj – ĝi ja estis verkita prefere por intima meditado.

**Inaŭguro de la ekspozicio de infandesegnaĵoj**

## Infandesegnaĵoj el Pazarĝik

Infandesegnaĵ-ekspozicion aranĝis la Packomitato de Hungara Esperanto-Asocio en la Budapeŝta Kulturdomo József Attila. Kion komunan havas Esperanto kaj desegnaĵoj? Tion, ke ĉi tiujn desegnaĵojn kolektis kaj elektadis esperantistoj de la bulgara urbo Pazarĝik el la lernejoj de sia propra urbo kaj de kelkaj ĉirkaŭaj vilaĝoj. La materialon ili transsendis al sia ĝemelgrupo, al la Budapeŝta esperantista klubo „Egressy" petante similan ekspozicio-materialon interŝanĝe. Kun la juna kaj entuziasma desegnaĵ-instruistino Gabriella Csik la Packomitato de HEA volonte kaptis la okazon ekirigi serion de internacia ekspozicio-interŝanĝo el infandesegnaĵoj servante ankaŭ per tio la interkompreniĝon de infanoj diversnaciaj – la edukadon por paco.

La ĉarmaj, naivaj, sed sinceraj pentraĵoj, desegnaĵoj de infanoj 9–14 jaraj ekmovis la koron ankaŭ de plenaĝuloj, kaj la infanoj de la distriktaj lernejoj jam ekscitite pretiĝas por reciproki la ekspozicion. Ĉe la solena malfermo estis reprezentitaj la Landa Packonsilantaro kaj la Bulgara Kultura Centro.

**Kovrilo de la premiita disko**



# PANORAMO

Fasado de nova hospitalo

## Interferono – la mirinda materialo

La Medikamentkemia Fabriko, la Mikrobiologia Instituto de Universitato de Szeged kaj la Landa Hematologia kaj Sangtransfuzia Instituto fondis kompanion por la esplorado-evoluigo kaj produktado de interferono. Ĉi tiu medikamento povas esti grava batalilo kontraŭ virusoj kaj eĉ kontraŭ iuspeca kancero.

La produktado de interferono estas grava problemo por esploristoj en la tuta mondo. Pri tiu temo en Hungario okupiĝas ĉi tiu ĵus fondita kompanio, kies ĉefa tasko estas trovi tian produkto-procezon, per kiu interferono de pureco plej altgrada estos produktebla por kuracado de homoj.

Laŭ la planoj plej malfrue en la dua duono de 1981 oni produktos kaj eksportos jam plurajn milionojn da unuoj el nerafinita interferono. El ties enspezo oni povos daŭrigi la eksperimentojn. Nome la esploristoj volas atingi kiom eble plej rapide – espereble jam en 1982 – la produktadon de interferono de pureco tiom altgrada, kiu estos jam elprovebla en kuracinstitutoj, elektotaj de la Sanitara Ministerio.

Antaŭ nelonge kunlaboranto de la Hungara Radio intervjuis la junan svedan profesoron d-ron Hans Strandler, kies publikaĵo antaŭ dek jaroj enflamigis la esploristojn pri sukcesa kuracado de ostosarkomo per interferono. Kun speciala ĝentileco li parolis pri hungaraj esploristoj. Evidentiĝis, ke lia majstro, kiu ekirigis lin sur ĉi tiu vojo, estis la hungara profesoro d-ro György Klein. La mondfama scienculo kune kun sia edzino d-ro Eva Klein en la sveda Karolinska Instituto laboras sur la tereno de kancero-esplorado.

D-ro profesoro György Klein

## Moderna hospitalo por la ĉefurbo

Nova kuracinstituto ekfunkciis en la ĉefurbo: la Sud-Peŝta Hospitalo. La moderne ekipita instituto provizore akceptas okcent malsanulojn, post plua evoluigo, ekde 1983 ĝi kapablos servi la prizorgadon de 1250 malsanuloj.

Sceno el programo de la ensemblo

## Hungaraj baletistoj tra la mondo

Okaze de la Bartók-centenario la balet-ensemblo de la Hungara Ŝtata Operejo kun speciala programo gastludas en pluraj landoj. La 26-an de aprilo komenciĝas ilia program-serio en Meksikio, en kies kadro la ensemblo partoprenos ankaŭ la internacian festivalon de Guanajuato. En junio la gastrolado komenciĝos en Prago, poste sesfoje ili rolos sur la scenejo de Scala en Milano kun specialaj Bartók-komponaĵoj. En la fino de junio ili jam prezentos sian programon en Chicago.

malmultekosta,
bongusta novaĵo

# HOT-DOG

## KOLBASO

48 Ft/kg

HÚSIPAR

# REVUO DE REVUOJ

Foje mi devas jam mencii inter miaj prirevuaj skizoj nian fervore batalantan ekologian organon EKOPERANTO, ĉar ĝi meritas plenan respekton de homoj, dezirantaj protekti nian mondon kontraŭ – ĉiaspecaj – danĝeroj. Kiom diversaj manieroj ekzistas bedaŭrinde por trafi la sanon, la vivan medion, nian mondon, kie ni devas plenumi la vivon! Industriistoj profitcele, faktoroj de la grundo „hazarde", laŭ fizikaj/kemiaj leĝoj faras la sian ofte por malbonigi cirkonstancojn, jen provizore, jen daŭre... Ĉu provizore, kiel mi ĵus skribis? Malgraŭ grandioza akcelo de la natursciencoj en nia jarcento, estas vero, ke ĝuste pri ekologio ĝia ŝuldo estas ankoraŭ tre granda. Tekniko, urbanigo kuras antaŭe, esplorado pri ties sekvoj neeviteble – ho, ĉu vere? – nur postkuras, kiel, pardonu, hundo post ĉaro. Despli deviga estas do lukti per ĉia ebla – ankaŭ persona – rimedo kontraŭ la *jam konataj* DANĜEROJ. Ĉu ne tiaj estas la cinikaj asertoj pri la plorindaj celoj de „limigita nuklea milito", kiu estas tute la sama, kiel la konata tragika, amasa memmurdo de religia sekto en Mezameriko...

Unu el la lastaj numeroj de LITERATURA FOIRO igis min vere malgaja, kvankam ne troviĝis sur la paĝoj tristaj aferoj. Mi nur malhavis beletron en tiu numero; krom lirle sonanta proza poemo de Baldur Ragnarsson ne legeblis literatura peco, eĉ ne kritiko. Kaj por konfesi, ne anstataŭis ilin la studoj pri tio, kio paralelas la literaturon, nome la postkulisaj agadoj akompanantaj la publikigon de verkoj. Nun la agoj kaj moraloj de aŭtoroj kaj eldonistoj fokusiĝis, iliaj interrilatoj. Aŭtora rajto, etiko de aŭtoroj kaj eldonistoj, jen titoloj karakterizantaj ĉifoje la *foiron*, ja tiu temaro koncernas la *merkaton*, por tiel diri merkaton de speciala, foje ekstravaganca varo: kulturo. Gardu dio de subtakso pri tiaj temoj, nepre gravegaj en E-a rilato, en nia iom aparta kulturo. La menciitaj interrilatoj de tiuj personoj, kiuj nepre troviĝas en la kultura ĉeno (al direkto de la publiko, kiu ĉeestas ankaŭ se ĝi ne aĉetas la kulturan produktaĵon) havas sian historion, havas ankaŭ nuntempan disvolviĝon (ni esperu: en bona direkto), kaj indas ilin studi. Studi tion, kio troviĝas malantaŭ la objektiĝinta *verko*, inter la ĉefaj partoprenantoj de la kultura merkato. Sed en LF iom tro vaste oni devas legi pri tiuj aferoj, historie, juristike, kio estis certe grava por la speciala kolokvo, okazintaj inter kelkaj eminentaj redaktoroj kaj eldonistoj, somere en Svisujo.

Eblas lanĉi demandon, kion volis la redaktoro? Ĉu informi pri la supra interrilato, fakte pri kontraktoj ligitaj (aŭ ligendaj) en la kontoroj? La historiemaj studadoj igas kredigi tion. Kompreneble eblas ankaŭ kroma tendenco, montri sekvindan vojon al ia kultursfera modelo en tiu ĉi rilato. Nun mi prefere konsideras, ke la revuo volis dokumenti tiun flankon de la kulturhistorio, kun rigardo al la ĉapitro „Esperanto" en ties pasinto kaj nuno. La pomo tamen montriĝis tro granda. En la E-a eldonado okazis plimalpli belaj kaj riskaj sukcesoj, okazis ankaŭ „aventuroj", bankrotaj elreliĝoj, same sindonaj „kavaliroj", veraj herooj de la E-a eldonado, pioniroj de la posta homaro. Oni devas konsideri gravega la spiritajn--merkatajn interligojn, ties fonon, ĉar tion bezonas la evoluo, la plua prospero, ĉar la tuto iel apartenas al nia movada--kultura memkono. Modeste mi pensas, kaj nur susurante, ke eble ne en tia mezuro versanta ĉion ĉi al la revu-legantaro. Mi fide kaj fidele trabaraktis min en tiuj studoj, por senti je la fino plian-pluan mankon. Jen pro malkonkretaj mencioj de faktoj, jen pro intimsajnaj aludoj, kaj – pardonu – ankaŭ ĉar mi estus leginta tamen pli pri honorario. Se oni ne ĉiam ricevas ĝin, almenaŭ ni legu pri ĝi.

Kun tre interesa enhavo aperis KONTAKTO, nun pri ekonomio montranta sufiĉe vastan trarigardon, celante precipe la diversecon de la ekonomiaj sistemoj, ekzistantaj en nia mondo. Multe da legaĵo, mi korektas, legindaĵo, kvankam neniu atendu, ke el la necese striktaj skizoj oni povos tre serioze juĝi, eventuale „elekti". Ĝuste tiuj artikoloj kulminis sukcese, kiuj celis orienti ne pri certa direkto, sed al la komparmaniero, kiu neniel estas ia ventfacila, supraĵa ago.

Se mi karakterizas la revuon SEKSO KAJ EGALECO virine bunta, eble mi falas en sulkon de diskriminacio en okuloj de troigantoj, kiuj akcele pelantaj egalecon de virinoj, prefere dezirus forigi distingojn ekzistantajn de la genroj, de iliaj karakterizaj ecoj. Nenia timinda estas en tio, se *tiuj ecoj* pluekzistos. Ĝis ekstremo – kontraŭ la naturaj faktoj – ne indas, nek valoras penadi: la homaro estas kaj restas *gea*, restas distingaj trajtoj eĉ se vi ne serĉas ilin en anatomia libro. *Restas* multaj, faktaj kaj maljustaj diskriminaĵoj, kiuj bezonas kontraŭbatalon! Pri tiuj diskuti, esplori la farendojn, kaj agi, helpi, eĉ subteni kolektas multajn laŭdinde tiu ĉi revuo en interesiga formo. Alifoje ni revenos al la „lingva diskriminacio" kontraŭ virinoj. Jes, ĝi ekzistas, kaj kiel la lingvo mem, ankaŭ ĝi estas socia fenomeno. Ties urĝeco – antaŭ ceteraj pli ŝarĝaj? – estas duba nuntempe. Ne preteriru la *efektivajn* problemojn de la ina vivo.

Ervin *Fenyvesi*

# Riveroj ne konas landlimojn

D-ro Ferenc László

## Internacia kunagado en akvomastrumado

**Hungara glacirompilo laboras sur la Jugoslavia Danubo**

Certe, riveroj ne konas landlimojn. Sekvas el tio, ke riveroj ne disigas la popolojn, sed kunligas ilin. La internacia agado estas do ege grava por la akvomastrumado en ĉiuj ĝiaj taskoj: utiligi la akvojn, kontraŭi se tiuj malutilas, protekti la akvokvaliton, kaj ĝenerale la akvomedion.

Tiuj flankoj de la akvomastrumado havas tutmonde kreskantan gravecon, kio bone speguliĝas ankaŭ en dokumentoj de la Monda Hidrologia Kongreso en Mar del Plata, 1977. Ankaŭ la hungaraj hidrologiaj instancoj nepre devas plenumi siajn taskojn kune kun la najbaraj popoloj, kiuj vivas en geografie unueca, komuna akvokolekta baseno.

La plejparto de la surfacaj akvoj en Hungario – 95% – devenas de translimaj teritorioj. Sescent km-ojn longe riveroj kaj akvofluoj servas kiel landlimoj; tio estas preskaŭ triono de la tuta limlongo. La landlimojn trafluas 90 diversgradaj riveroj, ĉar Hungario estas la plej profunde situanta parto de la Karpata baseno. Kompreneble la inundoj, defluantaj de la ĉirkaŭaj montaroj, ofte danĝerigas la Hungaran Ebenaĵon. Ĉe malalt-akvo jam prezentiĝas neceso de internacia divido de la akvohavaĵoj por kontentigi la akvobezonon de la loĝantaro, industrio, agrokulturo en Hungarlando. Aliflanke, pro la ekonomia kresko en la najbarlandoj

ankaŭ la malpuriĝo de la riveroj enfluas, malutile al la Hungarlanda akvoreto.

Dum la pasintaj 3 jardekoj kreskis la akvokonsumo kaj en Hungario, kaj en la najbarlandoj, sekve de la progreso ĝenerala. Pro tiu kreskinta akvobezono necesas zorgi precipe pri la internacia divido de la akvohavaĵo. Kun atento al la reciprokaj interesoj, al la klimatdiferencoj kaj al la kontraŭinundaj faroj de la landoj, eblos atingi, ke la sube situantajn landojn ne nur la inundprotekto ŝarĝos, sed okaze de bezono ili ricevos konvenan parton de la dividita akvohavaĵo.

La ekonomia progreso de la lastaj jaroj iĝas eĉ pli urĝa la teknikan kaj ekonomian kunagadon por eviti ekonomiajn malavantaĝojn en la koncernaj landoj. Depende de la nivelo ekonomia kaj teknika, de la naturkondiĉoj en la akvokolekta baseno, la kunagadoj laŭgrade koncernas ankaŭ la akvoutiligon kaj la preventadon de damaĝoj. Komence la interrilatoj ĝenerale konsistas el reciproka informado pri geografiaj, ekonomiaj kaj teknikaj indikoj, sed poste eblas atingi plenan akordigon en la utiligo kaj preventado.

Nuntempe forte rapidiĝis la scienca–teknika progreso, la teknika revolucio grandpaŝe disvolviĝis tra la mondo. Konekse kun tio multiĝis la internaciaj kontaktoj. Jam ne ekzistas lando, kiu kapablus memstare, aŭtarkie disvolvi sciencon kaj teknikon sen riski postreston en la internacia konkuro. La geografiaj interligoj, la reciprokaj interesoj orientigas la landojn al kunagado, unuavice per duflankaj interkonsentoj, kvankam jam oni rekonas pli kaj pli la neceson de plurflanka kunagado.

En la lastaj jardekoj disvolviĝis vasta kaj multflanka kunagado fare de la hungara akvomastrumado:

– kun landoj de la sama akvokolektejo por akordi plenumojn de komuninteresaj hidrologiaj problemoj;

– por solvi sciencajn–teknikajn hidrologiajn problemojn;

– por kune agadi en eksterlanda komerco.

La ŝtatoj de la komuna akvokolektejo havas en la hidrologia kunagado kiel celon la komunan trezoron: la akvon. Estas klare, ke ili volas ĝin plejeble utiligi, ĝiajn damaĝojn kune preventi, en interligo vivante en unu akvokolekta regiono, kiun tamen distrancas limoj de ŝtatoj. Respektante iliajn realajn interesojn, oni devas kunagi en maniero akceptebla por ĉiuj, ĉar la Danubobaseno prezentas vastajn eblojn por ŝtata kunlaboro.

**Komuna hungara-rumana digokonstruado ĉe la landlimo**



La plimulto de la apud-Danubaj landoj ekspluatas la riveregon kiel kontinue rekreiĝantan, naturan energifonton. Oni planis 27 Danubajn akvocentralojn, el kiuj 20 jam funkcias. Ankaŭ Hungario aliĝas al la akvoenergion ekspluatantoj per konstruo de la Akvocentralaro Gabĉikovo-Nagymaros. Tiaj akvonodoj krom la energioproduktado ankaŭ plibonigas la navigaciajn kondiĉojn, kaj forte efikas al la fluktuado de la riverego. La akordita funkciigo reduktos la inundajn altakvojn, alitempe kreskigos la malalt-akvon. Tio estas tre necesa ankaŭ en internacia rilato, ĉar sen tio la inunda danĝero kreskos, la ĉiel katastrofa malalt-akvo eĉ pli malkreskos.

Danubo estas grava bazo por kontentigi la kreskantajn akvobezonojn en multaj landoj. Trinkakvo, akvo por industrio kaj agrokulturo estas en kelkaj landoj tiomgrade bezonataj, ke estas jam malfacile kontentigi la sube situantajn landojn. Ekzistas projektoj, kiuj planas eĉ amasan forkondukon de akvo inter diversaj teritorioj – kaj tio povos eventuale krei kelkloke krizan situacion.

La tutan situacion embarasas, kaj la plurcelan utiligon de Danubakvo limigas la ade kreskanta malpurigo de la riverego. Bedaŭrinde en la plejmulto de la apudaj landoj Danubo servas kiel akceptanto de poluakvoj venantaj de la loĝantaro, industrio kaj agrokulturo. Necesegas do internacia akordo por haltigi pluan difektiĝon de la akvokvalito.

La ŝiptrafiko sur Danubo forte kreskos, precipe kiam ekfunkcios la kanalo Danubo–Rejno–Majno. Laŭ prognozoj la etapo Rejno–Komàrom (Komarno) havos trafikon en jaro 1985 pli ol 15 milionojn da tunoj, kaj en j. 2000 ĝi duobliĝos je 30 milionoj da tunoj. Internacia kunago necesas por severe malhelpi malpurigon kaŭze de ŝipoj, ankaŭ kaŭze de ŝiprompoj, kaj por tiuj lastaj (ĉe averioj) unuece reguli la farendaĵojn. Servoprete eblas observi, alarmi kaj likvidi la al-




**En Sirio oni starigas hungaran akvoturon**

fluantan malpuraĵon, nur se ekzistas tiucele internacia sistemo.

Por la akvoprotektado estas necesa konvencio akceptebla por ĉiu apud-Danuba ŝtato – ĉar nur per multflanka kunagado estas prizorgeblaj la problemoj de Danubo oni devas konsideri *unueca.* Tio signifas, ke ankaŭ ĉe ĝiaj flankriveroj validas la samaj principoj por la akvomastrumado.

La unua grava iniciato por organizi kunagadon en la Danuba akvomastrumado estis la Kompleksa Programo de la Konsilio por Reciproka Ekonomia Helpo (KREH). Laŭ tiu programo la koncernaj ŝtatomembroj devas prilabori siajn konceptojn, kiel ili volas disvolvi la kompleksan hidrologian kunagadon en la Danub-baseno. Tiuj laboroj konvene daŭras.

Por zorgi pri la limaj akvoj, Hungario ligis kun la najbarŝtatoj duflankajn kontraktojn. Tiu montriĝis taŭga formo de kunagado. Interŝtataj kontraktoj estas ligitaj jam kun ĉiuj najbarlandoj, de kun Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Rumanio kaj Sovetunio. Aparte bone sukcesis la protekto de la limakvoj kun Ĉeĥoslovakio, precipe gravaj pro la industria medio.

Komenciĝis plurflanka kunagado rilate la akvokolektejon de Tiso. Partoprenis unue Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Sovetunio, al kiuj poste aliĝis Jugoslavio kaj Rumanio. La landoj, havantaj teritoriojn en la baseno de Tiso, jam de 1967 agas por krei kompletan kunagadon en la tuta baseno. Tiucele estis gravega paŝo la Konstanta Agadgrupo (1972), kreita laŭ decido de KREH. Ĝin partoprenas ĉiuj ŝtatoj, interesitaj en la valo de Tiso, do ankaŭ nubo. La tutan akvokolektan basenon de Danubo oni devas konsideri *unueca.* Tio signifas, ke ankaŭ ĉe ĝiaj flankriveroj validas la samaj principoj por la akvomastrumado.

Jugoslavio (ĝi ne estas membro de KREH). La tutan agadprogramon kunordigas Hungario.

En 1972 estis subskribita la plandokumento de la akvokvalit-protekta projekto por Danubo (Hungarlanda supra etapo) kaj por akvokolektejo de Sajó (Slana). Laŭ la projekto – kiun subtenas la Fonduso por Evoluigo de UN – oni estigis aron da observejoj, kio favoras la protekton de la akvokvalito.

Estas preparata hungara–jugoslava–aŭstra kunagado por komune mastrumi la riverojn Drava (Drau) kaj Mura. Por tiuj riveroj oni lanĉis ankaŭ eventualan „projekton", same kun apogo de UN. Dum la sistema kunagado okazas akordigo de planoj pri kompleksa akvoutiligo de Drava. Eventuale eblos komune instali por ĝia kanalizado la necesajn akvocentralojn. Jam montriĝas, ke inter la centraloj, planitaj de Jugoslavio, la centralaro Djurdjevac–Barcs utile povos servi ankaŭ interesojn de Hungarlando. Tial ĝia „instala celo" – laŭ kiu oni decidos pri la komuna investo – estos kune preparata. Menciindas, ke sur la Jugoslavia etapo de Danubo daŭras efika kunlaboro por riverreguligo kaj vintre por glacirompado.

La perspektivo almontras apud la nunaj duflankaj konvencioj al regiona kunago en la akvomastrumo, t.e. inter ĉiuj

landoj interesitaj en la Karpata-baseno.

### La bezono de internacia informado kreskas

En la baza fakto, ke akvoj ne konas landlimojn, nature sekvas, ke intervenon en hidrologion de riveroj, trafluantaj plurajn landojn, ne eblas fari izolite, ĉar la konsekvencoj sin prezentos en la komuna akvokolekta baseno. Malpuraĵo enlasita en la fluon trapasos la landlimon, kaj manifestiĝos en la najbara lando. Por bari kaj likvidi la translimen etendiĝantajn malpuraĵojn jam ne estas malhavebla la fidinda kaj rapida informado al la koncernaj landoj. Tio klarigas, kial kreskas forte en la internacia kunagado la graveco de la reciproka informado. Por preventi la mediajn nocojn, ŝanĝiĝas nun la pezocentro de la informado: anstataŭ kontroli la „finprodukton", estas preferinde observi la krizajn malpuriĝojn, t.e. la poluadajn procezojn en la hidrosfero kaj akvokolektejo. La loka kontrolado estas sisteme kompletigata per medio-observadoj de la regiono, kontinento, eĉ Terglobo! La akvoprotekton celanta nacia informkolektado, la esplorado kunfandiĝas en internaciaj programoj.

Ekkoni la akvohigienajn perturbojn kaj organizi ties likvidon bezonas konstantan, kunordigitan agadon de pli kaj pli da landoj. La novaj zorgoj en akvoprotekto necesigas bone ekipitan, fidinde kaj ekonomie funkciantan informservon. Informadiko estas la nomo de tiu scienco, kiu traktas la gravajn funkciojn de la komunikado-ĉeno (registro, kontrolo, orientigo, indicondono), nepre necesajn por la moderna ekonomia vivo.

Rapide kreskas specoj de la akvoprotektaj informoj, ankaŭ ties kvantoj, kaj tio urĝe bezonis disvolvigi konvenan dokumentadon de la indikoj. Tutmonde ekis novtipaj agadoj: por taŭge manipuli la indik-amason, oni prilaboras vortarojn de akvoprotektaj konceptoj, katalogojn de indikofontoj, de indikoj, registrojn, kodsistemojn, k.a. Relative nova estas la klopodo formi *regionajn* informadsistemojn por akvoprotekto. Ties celo estas internacie studi, analizi la polucion, kiu minacas la komunajn hidrosferon kaj akvokolektejojn ties fontojn kaj vojojn (trajektoriojn). Certe ankaŭ la teknologio de la protektado, la tiucela labordivido progresos helpe de tiu sistemo.

Novtempe danĝere kreskis kaj vastiĝis la efikeco kaj la daŭro de la koncentritaj, ankaŭ de la difuzaj (disiĝantaj) polucioj. Tio kreis tute novajn kondiĉojn koncerne la kapablon de akvoj akcepti kaj transporti malpuraĵojn. La ekonomia rolo de akvoj ampleksiĝis, same la uzosferoj, kaj pro tio nun kreskas la intereso pri ekologiaj konsekvencoj de la kvantaj kaj kvalitaj ŝanĝiĝoj de la akvoj.

Pro la kvanta kresko kaj kvalita modifo de malpurakvoj kaj polucioj, la akvorezervojn ŝarĝas eretoj de venenaj kaj sanon minacantaj, organikaj kaj neorganikaj materialoj. Tio pliigas la respondecon de la koncernaj landoj por etendi la akvoprotektajn kontrolojn ankaŭ al la mikropoluaĵoj. Se necese, ankaŭ tiujn informojn oni devas komuniki al la danĝerigataj landoj.

**Hungara „akvoglobo" en Bulgario**



### Scienca–teknika kunago

Pro la grandioza progreso de la tekniko, ĉiu lando klopodas partopreni en la internacia scienca labordivido, eluzi ties avantaĝojn kaj utiligi la alilandajn rezultojn de esploroj kaj teknikaj modernigoj. Neniu lando kapablas en ĉiu kampo mem esplori, kaj mem solvi ĉiujn problemojn, pagi ties gigantan elspezojn. La partopreno en la internacia scienca labordivido, signifas koncerne la bazajn esplorojn la konon kaj uzon de la eksterlanda fakliteraturo. Koncerne la teknikan modernigon oni klopodas rezigni pri certaj provoj, eksperimentadoj por anstataŭigi tiujn per transpreno, aĉeto de licencoj, patentoj kaj specialaj metodoj, scioj.

Inter la objektoj de akvomastrumadaj esploroj troviĝas hidrologiaj fenomenoj, forte influataj de naturaj faktoroj, ekzameneblaj nur surloke. Aliaj fenomenoj ne dependas de la loko, ĉar laŭ la konataj parametroj ili estas ie ajn ripeteblaj por ekzameni. Tiaj estas fenomenoj hidraŭlikaj kaj hidrokemiaj, ankaŭ inĝenieraj problemoj koncerne konstruadon, funkciadon aŭ fabrikadon.

Konsiderante tion, ni klopodas en la internacia hidrologia kunagado partopreni laŭ la sekvaj:

– helpi la realigon de niaj longjaraj aŭ mezlongaj planoj;

– transpreni aŭ komune ellabori temojn, kiuj ebligas pli ekonomiajn rezultojn, aŭ por kiuj ĉe ni mankas kapacito;

– transdoni niajn proprajn rezultojn (aŭ nian adaptaĵon) al landoj, kiuj petas ilin;

– helpi niajn scienculojn ekkoni rezultojn de aliaj landoj, kaj al la alilandaj ebligi, ke ili ekkonu niajn rezultojn.

### Scienca–teknika kunagado kun socialismaj landoj

Por la Hungarlanda teknikon moderniganta esplor-agado estas fundamenta la scienca–teknika

kunagado de la Konferenco de hidrologiaj direktoroj, kadre de KREH. Tiu konferenco organizas la ekonomian kunlaboron (inkluzive profilizadon, labordividon), la akordigon de ,longdaŭraj planoj, kaj kompreneble ankaŭ la sciencan kunlaboron inter la hidrologiaj organoj de la membroŝtatoj.

El la lasttempaj akorde plenumitaj esploroj menciindas: unuecigo de hidrokemiaj ekzamenadoj, de hidrologiaj mezuradoj kaj prilaboroj, de akvokvalita klasifiko ĉe naturaj fluoj, katalogizado de hidrologiaj mezuriloj, ekonomiaj metodoj por purigo de diversaj industriaj poluakvoj, studado de praktikaj akvopurigaj instalaĵoj, k.a. Krom la supre menciitaj kunagoj, la hungaraj hidrologiaj instancoj ligis ankaŭ duflankajn interkonsentojn kun socialismaj landoj por komune ekspluati la avantaĝojn de scienca–teknika kunlaboro.

Internacia specialiga kurso pri hidrologio en Budapeŝto, 1975

### Hidrologia kunagado kun evolulandoj

Laŭ siaj ekonomiaj kapabloj Hungarlando prezentas ankaŭ signifan helpon al evolulandoj en la kampo de akvomastrumado. Ekzistas jam senpera kunagado kun Mongolio, Kubo, Alĝerio, Irako, Hindio kaj Tanzanio en tiu rilato. Hungaraj fakuloj laboris aŭ laboras tiucele en 26 evolulandoj; en universitatoj de naŭ landoj ili instruis hidrologiajn sciojn.

Tiun multflankan evoluhelpon bone spegulas kelkaj gravaj hidrologiaj plenumoj, ĉe kiuj Hungario signife partoprenis:

– projekto pri akvomastrumado (Mongolio, Irako, Tanzanio, Niĝerio);
– akvorezervujoj (Ganao, Sirio, Egiptio);
– provizado per trinkakvo (Tanzanio, Mongolio, Ganao, Alĝerio, Kuvajto);
– irigacio (Tanzanio, Araba Respubliko Jemeno, Popoldemokratia Respubliko Jemeno, Maroko, Alĝerio, Niĝerio);
– esploro pri akvohavaĵoj (Mongolio, Irako, Libio, Kuvajto, Araba Resp. Jemeno, Kubo);
– riverregulado (Irako);
– fiŝmastrumado (Nepalo, Venezuelo, Egiptio, Ganao).

Valbarajon planas hungaraj inĝenieroj en Jemeno



Ĝenerale la celo estas ekonomie evoluigi la koncernan landon, pere de planoj, ekspertado, direktado de instalaĵoj. Sed la hungaraj ekspertoj kontribuas en ĉiu okazo ankaŭ al la mensa ampleksigo de la evolulandoj, zorge perfektigante la loke kunlaborantajn fakulojn. Kompreneble ekzistas ankaŭ tiaj komisioj de la landoj, kiuj celas mem la edukadon.

### Hidrologia agado en organizoj de UN

La baza celo de la UN-organizoj ĝenerale havas ekonomian karakteron. La sciencaj esploroj apartenas unuavice al Unesko. Tamen, dum realigo de ekonomiaj projektoj troviĝas ofte hidrologiaj problemoj, kies solvado koncernas ankaŭ aliajn sciencojn. Tial la organizoj de UN okupiĝas multrilate kun scienca esplorado de akvomastrumado.

**Inaŭguro de akvoprovizilo, establita de Hungario, en Tanzanio**

La brilan prosperon de la hidrologia esplorado alportis gravega konstato: pro akcelo de la ekonomia evoluo, de la urbanizado kaj industriigo, tiomgrade kreskas la bezono je akvo, ke ĝi jam ne estas kontentigebla el la naturaj havaĵoj. Por preventi la minacantan akvomankon, estas necese kalkuli la rezervojn, kaj racie mastrumi pri ili. Ĉio ĉi bezonas profundajn konojn pri la akvocirkulado kaj tutmondan akordigon por sciencaj esploroj.

En Unesko tiucele estis kreita aparta sekcio por hidrologiaj sciencoj. Sammaniere, la agado de Monda Organizo pri Meteorologio (MOM) estis kompletigita per hidrografiaj temoj, kvankam antaŭe ĝi okupiĝis nur pri akordigo de meteorologiaj mezuradoj kaj esploroj. Tiun progreson de la hidrologia esploro en monda rilato manifestas la Internacia Hidrologia Jardeko organizita de Unesko, kaj la tion sekvantaj Programoj de Unesko kaj MOM, krome la jam menciita Monda Hidrologia Kongreso de UN.

En diversaj societoj multflanke partoprenas hungaraj scienculoj, ekspertoj. Multaj estis honoritaj pro siaj fakaj rezultoj per gvidaj funkcioj en la internaciaj sciencaj organizoj.

Tradukis: E. *Fenyvesi*

## Servas por la faciligo de la laboro

# la segilmaŝino
## por viando kaj osto

# – higiena
# – potenca
# – ekonomia



La segilmaŝino por viando
kaj ostoj taŭgas por tranĉado de viando,
ostoj, ostoplena viando,
fridigitaj viando kaj fiŝoj.
La maŝino funkcias per elektra motoro,
kaj plenumas la tranĉadon,
dispecigon per ronda bendsegilo.
La maŝino ne nur faciligas la laboron,
sed faras ĝin ankaŭ
pli altkvalita kaj ekonomia.

Teknikaj datoj:
Longo 535 mm
Larĝo 523 mm
Alto 845 mm
Pezo 48 kp
Dikeco de tranĉaĵoj min. 12 mm
maks. 165 mm
Alteco de tranĉaĵoj maks. 200 mm
Necesa tensio 3x380/220 V, 50 Hz
Povo de la elektra motoro 0,75 kW
Rotacinumero de la elektra motoro 1420 r/m

KERIPAR

„KERIPAR" Entrepreno Produktanta
Maŝinojn kaj Instalaĵojn por Komerco
Budapest VI. Népköztársaság u. 43. Hungario.
Telefono: 313–124
Telekso: 22–6237
Vendas: MÜÁRT kaj VOSZK

Antal Végh

# Unutaga felicĉo

*La vidvino estas alta, magra. Kavaj, sekaj vangoj, amarsente kuntiritaj lipoj. Mandorsoj plenplenaj de verukoj. Iam, antaŭlonge, ŝi devus forigi ilin, ŝi pensadis pri tio, sed poste la operacio ne fariĝis, la verukoj restis – kaj nun, jam kial?*

*Ŝi loĝas ĉe la montopiedo, for de la vilaĝo, kicn malofte ŝi iras. Penige estas surgrimpi la monton, se ili bezonas ion el la vendejo, iras anstataŭ ŝi la bofilino. Kaj dume la vidvino finas la laboron, kiun la bofilino lasis.*

*La vidvino loĝas kune kun la filo. En la sama domo, sur la sama korto, tamen, ili mastrumas aparte.*

*Kiam la filo edziĝis, ili kuiris kune, sed iom post iom ili disiĝis, sen ajna interkonsento. Ili rimarkis nur, ke jen, ĉiuj vazoj, ĉiuj aĵoj, graso, faruno estas apartigitaj. En silento, sen laŭtaj voĉoj, sen kvereloj.*

*Pri la bofilino, la vidvino neniam plendis al iu. Nur unufoje ŝi flustris al najbarino, ke ĉiuj tagoj povus ja kunporti malpaciĝon kun ŝi.*

*– Ho, ve! – reflustris la najbarino.*

*Jen ĉio.*

*La vidvino povus flustri ankaŭ alion, ŝi tamen silentis. Eĉ en si mem nenion malbonan ŝi diris pri la bofilino, nur ripetadis, kiam tiu kolerigis ŝin:*

*– Mi ne eltenas ŝian ritmon ...je dio, mi neniel eltenas ĝin.*

*Kaj ene, sekrete ŝi kuraĝis meditadi pri tio, ke ŝi dezirus ne tian bofilinon, ŝi estus volinta, ke la filo edzinigu alian knabinon.*

*Vere, ankaŭ la filo ne tiun vojon elektis, sur kiu li nun marŝas. Sed kun la edzino, kun ŝi li akordas, kial do perturbi la pacon inter ili.*

*La edzo, la maljuna vinberkulturisto, ne estis tia, kia la filo. Li estis multe pli pretendema ĉiuaspekte. Se ŝi provus nur unufoje doni al li vespere prunajn knelojn kovritajn de frosta graso! Kiuj la tutan posttagmezon velkadis sur la malvarmiĝinta kuirforno, vizitataj de muŝoj, kaj vespere la bofilino metis ilin, duonvarmigitaj, antaŭ ŝia filo.*

*La filo estis ministo. Tie li ekkonis la knabinon. Hejmenveninte, foje, li menciis tion, kaj la patrino detale pridemandis lin. Kiuj, kiaj estas ŝiaj gepatroj, ĉu ŝi scipovas kuiri, ĉu ŝi ŝatas labori? Al ĉiu demando la filo respondis: jes, kompreneble, jes ja! Kaj ke la kuirado ne gravas, ĉar ili manĝas en la laborejo. Tutajn tagojn li fajfadis, kantadis, razante sin ĉiumatene, rigardante sin plurfoje en la spegulo.*

*La vidvino observadis sian filon kaj eĉ ne provis konsili, ke li ŝanĝu sian intencon.*

*Forttalia, alta, riĉbrusta knabino estis la bofilino, kun mallongaj, knabecaj haroj. Tiom multe da puloveroj ŝi havis, ke la vidvino preskaŭ hororis vidante ilin.*

*– Ve, mia filino – ŝi diris –, dank' al dio, ĉi tiuj sufiĉos dum via tuta vivo!*

*– Ha! ha! – ridis la bofilino –, kiafojn vi eltrovas, panjo! Ĝuste tio mankus! Ĉi-semajne mi volas aĉeti unu kaŝtankoloran kaj ankaŭ alian, el maldika ŝtofo.*

*Ĉi tio okazis en la tagoj post ilia transloĝiĝo hejmen. Ĉar komence la juna paro ne ĉi tie loĝis, sed en la minista kolonio, en ŝtata loĝejo.*

*Foje la filo komencis tusadi. Tamen li malsupreniradis en la minejon, ĉar tiutempe ili bone enspezis. Okazis, ke eĉ tri aŭ kvar mil forintojn. Li ne volis ĉesi labori, nek unu solan tagon.*

*Magriĝanta, la vizaĝo ĉiam pli griza, la filo devis ja viziti la kuraciston. La vidvino neniam antaŭe aŭdis, kion oni diris, ke la pulmojn de l' filo povis enpenetri polvo.*

*Ŝi enpensiĝis: en ŝia iuneco, dum la rikoltadoj, ili englutis–elsputis tiom da polvo, sed ĝi ne eniĝis en la pulmojn.*

*La klarigon ŝi trovis en tio, ke la mineja polvo estas alispeca.*

*La laborkapablon de la filo baldaŭ oni deklaris malpliiĝinta. Ricevante ĉiumonate mil sepcent forintojn, li neniam plu devis malsupreniri en la minejon.*

*Finfine ili hejmenvenis. Du arpentoj da vinberejo estas proksime de la domo, la kooperativo ne volis preni ĝin, kvankam tiutempe ili volis transdoni la parcelon – kiom bone, ke ĝi restis.*

*La vidvino havas bovinon, ankaŭ la filo. Ambaŭ bovinojn melkas la vidvino, ĉar la bofilino diris, ke ŝi maltoleras la odoron de la freŝa, neboligita lakto, ĝi naŭzas ŝin. La filo volis vendi sian bovinon, sed la patrino petis lin, ne vendu, ĝin ŝi melkos.*

*La maljunulino kutime antaŭprojektas ĉion. En novembro ŝi aĉetis anseron, por cent forintoj. La ansero estis malgrasa. Ŝi ekhavis la ideon ĝin grasigi kaj vendi ĝis Kristnasko, tiel perlabori la monon por la festaj elspezoj. Almenaŭ ducent forintojn ŝi gajnos, nete.*

*Jam la trian tagon ŝi enŝtopis la nutraĵon en la anseron, kiam venis la ideo: penadante nur iomete pli, eĉ du anserojn ŝi povos nutri. Aĉetu malgrasan anseron, diris la vidvino al la filo kaj bofilino, ŝi nutros ĝin, ankaŭ ili havos tiel la monon por la Kristnaskaj elspezoj.*

*– Eĥ, kial spekulacii? – diris la bofilino.*

*Kvin tagojn poste la filo tamen aĉetis anseron, kaj la vidvino nutris, ŝtopis ambaŭ. Bravaj brutoj estis la anseroj, ili grasiĝis, eltenante la ŝtopnutradon.*

*En decembro fariĝis malvarme. Vespere kaj frumatene, kiam la vidvino enŝtopis en la anserojn la malsekan maizon, la akvo ofte glaciiĝis sur ŝiaj manoj. Kvankam ŝi apudmetis ĉiam varmetan akvon, sed ĝi rapide frostiĝis.*

*Ŝiaj longaj, ostozaj, maldikaj brakoj apenaŭ povis eligi kaj enigi la anserojn en ilian kaĝeton. Kaŭriĝanta ĉe la ujo, ŝi enŝtopis la maizon en la bekojn de l' brutoj. La vidvino sentis, ke ŝia talio preskaŭ dislokiĝas.*

*La akraj, dentaj anserbekoj vundis ŝiajn manojn, fingropintojn.*

*La maljunulinon ege suferigis la klopodado kun la anseroj.*

*La plumoj de l' anseroj flaviĝis, ilia grasa dorso duonrondiĝis. Ĉiam pli pene estis levadi ilin.*

*Plurfoje ŝi ja pensis, ke tio jam ne konvenas por ŝi, pentante, ke ŝi komencis la anserŝtopadon. Tamen ŝi ĝojis, ke la bestoj grasiĝas. Eĉ pri la ducent forintoj, kiujn profitigos la propra ansero, ŝi jam decidis.*

*Sed krome ekestos ankaŭ la aliaj ducent forintoj. Ĝustadire, ankaŭ tiu sumo estos ŝia donaco, ĉar la bofilino ne devis movi eĉ unu fingron por akiri la monon. Estas ŝi, kiu ankaŭ ĝin perlaboras por ili.*

*Antaŭ Kristnasko ŝi menciis, ke oni povus jam alporti la anserojn al la aĉetejo.*

*– Ni diris, kial vi penadas kun ili, panjo – respondis la bofilino. – Nu, jen, ni devas pestaĉadi kun anseroj, nun, kiam oni estas antaŭ la festoj, kun aro da farendaĵoj.*

*La vidvino eĉ unu vorton ne prenis sur la langon. Sabaton matene, antaŭ la festo, ŝi pretigis la du ansajn korbegojn. En la fundon ŝi metis pajlon, se la anseroj ekskrementas, ne malpuriĝu la vergoj.*

*Antaŭ ol lokigi la brutojn en la korbegoj, ŝi pesis ilin, alvokante ankaŭ la bofilinon. Ses kaj duono, ses kaj duono.*

*– Kiel bone – ŝi ekĝojis, ne memorante jam kiu ansero apartenas al la bofilino kaj kiu al ŝi. Tiel, almenaŭ ili ne devos dividi inter si la monon, ĉar la du anseroj havas precize la saman pezon. Ankaŭ la bofilino rimarkis tion.*

*– Nu, mi jam foriras – ŝi diris al ili, estantaj en la kuirejo.*

*– Bone, bone, nur rapidu – respondis la bofilino.*

*La vidvino kovris la ŝultrojn per la granda, nigra tuko, unu ansero sur unu brako, alia ansero sur alia brako, kaj ŝi ekiris direkton de la monto, al la kooperativa aĉetejo de kortbirdoj.*

*Ŝi povus surmeti ankaŭ vintran surtuton, ĉar ŝi havis ĝin, sed vestita en ĝi, ŝi paŝadus pli pene. Tiel ŝi marŝadis pli libere. Kiam oni iras, la piedoj ne malvarmas, nur la supra parto de l' korpo, sed tie ŝi preme tordis ĉirkaŭ si la tukon.*

*Montosupren, la vojo estas glita.*

*Iam, pratempe, ekzistis onidiro de la najbarvilaĝanoj: stulta estas tiu vilaĝo, kiu ekloĝas surmonte, se ĝi havas la vinberejon vale. Ili nur grimpados, glitados supren-malsupren.*

*Pri tio ekmemoris la vidvino, pensante, ke vere estus pli bone, se tiam la vilaĝo estus ekloĝanta ĉi tie, en la valo, anstataŭ en tiu fajrofulma loko.*

*Sed oni devas supreniri, se la vilaĝo estas jam tie.*

*Malproksime ĝi ne estas, ĉirkaŭ tri kilometroj tien-reen. Tiel, grimpante, kvazaŭ estus ses.*

*– Neniam mi pensis, ke du anseroj povas pezi tiom – balbutis la vidvino por si mem. La korbegoj tiris malsupren ŝiajn ŝultrojn, la vergoj de la ansoj enprofundiĝis en la magraj, vejnaj brakoj.*

*La vidvino rapidis.*

*Iom poste ŝi malstreĉis la tukon, ĉar ĉiam pli pene estis spiradi.*

*– Nur ses kaj duono, ses kaj duono unu kaj la alia! – kaj ŝi demetis la korbojn, en la neĝon. La anseroj palpebrumante ekzamenadis la neĝon, observadis la sunon, kaj strange tordadis la kolon.*

*La vidvino konstatis, ke ne estas inde demeti la korbojn, ĉar tiel multe pli malfacilos levi ilin. Delokiginte la ansojn sur la brakoj, post kelkaj paŝoj ŝi sentis, ke tiel estas eĉ pli malbone. Ŝi remetis la ansojn sur ilian antaŭan lokon. Tiel ili jam ne entrancis tiom ŝian torporan karnon. Kvazaŭ sur la ostoj ŝi portus la korbojn. La vergoj forprenis la velkintan karnon de la brako, kaj la haŭto algluiĝis al la tendenoj.*

*Ŝi ne intencis demeti la korbojn, tamen ŝi devis. Sur la antaŭbrako ŝi refaldis la manikon kaj per la salivita fingro frotis la haŭton, kie enpremiĝis la vergoj.*

*Ĝi jukis kaj estis agrable froti ĝin. La haŭto ruĝiĝis kvazaŭ estus brulvundita, sed por morgaŭ malaperos la difekto, kelkfoje jam okazis la samo.*

*Nenieł ŝi kapablis klarigi por si, kien el la homo eliras la fortoj. Ne tiu forto, kiu loĝis en ŝi, iam, en la juneco, sed nur tiu, tiuj fortoj, kiujn ŝi sentis, foriranta de la hejmo. Ĉar nun, kvazaŭ ĝi lasus ŝin.*

*La vidvino paŝadis kaj sentis, ke la malseka vestaĵo tiriĝas sur la dorso, ĉiupaŝe. Ŝi ŝvitis iom.*

*Ekvidinte la kooperativan aĉetejon, ŝi jam marŝadis kalkulante la paŝojn. Ŝi kalkulis precize kaj ritme, por ne senti la surbrakajn korbojn. Kiel fariĝis la lastaj paŝoj, pri tio ŝi jam eĉ ne memoris. Kvazaŭ ŝi sentus iometan svenon enkape. Kiom da paŝoj ŝi kalkulis, tion ŝi ne sciis, kvankam dum la tuta tempo ŝi ne pensis pri alio. Alveninte ŝi eĉ ĝojis, ke la aĉeteja pordo estas ŝlosita, tiel almenaŭ ŝi povos iom spiradi. Ĉar enirante tuj, pro laceco ŝi ne povus ekparoli.*

*Brue aeruminte la pulmojn, ŝi ĉirkaŭrigardis. La aĉetisto nenie videbliĝis, tial ŝi atendis, pacience.*

*Poste ŝi iradis tien-reen, ĉirkaŭ la domo. Oni konsilis al ŝi ne atendi plu, sed iri en la drinkejon, ĉar la aĉetisto estas ene. La anserojn la vidvino zorge metis apud la muron, kaj ŝi alpaŝadis la drinkejon. Tiu, kiun ŝi serĉis, sidis ĉe la servotablo. La aĉetisto iom malvolonte ekstaris, tamen li baldaŭ venis.*

*– Ej, ej, onjo Marta, kial vi abruptas, kien vi rapidegas? Ĉu vi kredas, ke tiel vi plu vivos? Ne hastu, ne rapidu!*

*La duopo iris al la aĉetejo.*

*– Kaj vi penadas nun, en la lasta momento? Se la kamiono ne venos posttagmeze, estu mi, kiu manĝos viajn anserojn? Aŭ mi gardu ilin ĝis la postfesto, dum du tagoj, ke ili malgrasiĝu?*

*La vidvino diris nenion.*

*– Kvin kaj duono, kvin kaj duono – faligis la pesilbrakon la aĉetisto.*

*– Kvin kaj duono, kvin kaj duono – la maljunulino grumblis –, sed mia aŭtentika pesilo montris ses kaj duonon. Tiom, eble eĉ dek dekagramojn pli, kiel mi vidis.*

*– Dumvoje certe vi ofte pisigis ilin – ridaĉis la aĉetisto. – Estas ĉi pesilo kiu validas, kaj ne la via, tiu rusta fiafo! Nu, ĉu mi kalkulu?*

*La maljunulino fus pensis, ke du kilogramoj estas pli ol okdek forintoj. Tamen, se temus nur pri la okdek! Sed ankaŭ la bofilino vidis, ke la anseroj pesis ses kaj duonon. Ŝi kapablos eĉ pensi, ke la bopatrino dekalkulis unu kilogramon, gardante por si la monon.*

*La aĉetisto ekflamigis alumeton, tiel li montris la pesilon: la vidvino povis konstati, ke vere, la anseroj pesas kvin kaj duonon.*

*La dikan tukon ŝi ekpremis sub la mentono, kaj ŝi levis la korbojn, metante la ansojn sur ilian antaŭan lokon. Silentpaŝe ŝi ekiris hejmen.*

*Pensante pri la bofilino, ŝi ekmemoris tion, kiam, aŭtune, ŝi gardis por si ducent forintojn el la prezo de l' desertvinberoj. Kial panjo tremas por la mono, diris la bofilino, eble sian ĉerkon ŝi volas moligi per ĝi? Intervenis ankaŭ la filo: ke la patrino, laŭplaĉe, nur gardu por si la monon.*

*Sed la sekvan tagon la vidvino donis la ducent al la bofilino, sen scio de la filo.*

*Demetante la korbojn por ripozi, ŝi sentis, ke la brakoj tremadas. Ŝi ekkalkulis. Se trifoje ŝi demetos la korbojn inter ĉiuj telefonkolonoj, eble ŝi eltenos. Ne metante jam la korbojn sur la brakojn, ŝi portis ilin permane, la ansoj en la manplatoj. Tiel ŝi marŝadis pli facile, la anseroj ne pezis tiom. Ŝi prenis-premis la vergajn ansojn de l' korboj. Kio okazis al la fingroj, estas sekreto, ĉar ju pli ŝi premis, des pli la fingroj malstreĉiĝis. Fine, post du paŝoj, kontraŭstarante ĉiun ŝian klopodon, ili inertiĝis.*

*La vidvino haltis kaj ekatendis ĉe la vojo. La liberiĝintaj fortoj povas ankaŭ reveni en la korpon. Tion ŝi atendis.*

*Proksimiĝis kamiono, kiu, preterpasinte la maljunulinon, haltis. La kamiono direktiĝis en la kooperativan centron.*

*– Suprenmetu do la korbojn, mi transportas ilin volonte, de la centro vi jam facile piediros kun ili hejmen. Mi lasos la korbojn antaŭ la oficejo – kriis la ŝoforo –, tie vi trovos la anserojn, nur rapidu!*

*Sen la korboj la maljunulino paŝadis tiom senpene, ke ĉiuj malbonoj forgesiĝis. Nur iom pli poste ŝi ekpensis, kio okazos, se dumvoje ĝis la kooperativa centro la anseroj sufokiĝos. La ŝoforo metis ja ilin malantaŭ la veltolon. Se tiu peza tolo hazarde falas sur la bestoj, estas certe, ke la anseroj sufokiĝos. Ŝi eĉ volis diri al li,*

*ke li ĝustigu la veltolon, sed ŝi perdis la fortojn tiom, ke jam ne kapablis krii.*

*– Se la anseroj tamen sufokiĝos, almenaŭ ĝustatempe mi alvenu, por havi tempon tranĉi ilian kolon!*

*Tiu penso karuselis en ŝia kapo. La vidvino antaŭsentis, ke la du anseroj ĉiel sufokiĝos. Malsupren la monton, ŝi ekkuris.*

*Antaŭ la oficejo ŝi apogiĝis al la muro, rigardante la du anserojn, kiujn trafis nenia malbono.*

*– Dank' al dio – ŝi ĝemis.*

*La kooperativa oficejo troviĝas en malnova kastelo, apud la centro de la terkultura kooperativo. Antaŭ ol iu ajn ŝin povus ekvidi, la vidvino denove levis la korbojn.*

*– Ĉu vi ĉi tien alportis la anserojn? – aŭdeblis voĉo.*

*La maljunulino rigardis la alparolinton, kaj remetante la korbojn surteren ŝi rakontis, kio okazis. Prefere ŝi hejmenportos la anserojn, sed ne lasos, ke oni donu al ŝi malpli ol la ricevendaĵo.*

*– Tiaĵo ne eblas! – diris la librotenanto. – Impertinentaĵo, procedi tiel, lasi ke ĉi oldulino reportu hejmen la brutojn.*

*Ankaŭ ĉi tie la anseroj estas pesataj, ili eĉ superis iom ses kilogramojn kaj duonon.*

*– Nenien vi portu ilin – diris la administranto. – Ni ĉi tie akceptos la anserojn, ni pagas al vi kaj telefonos al la aĉetisto, ke li venu kaj transprenu la anserojn. Ne estas nur, ke li venos, li eĉ ĝoju, se li eliros senpune el tiu kaĉo.*

*Eble estis jam tagmezo, kiam la vidvino ricevis la monon. Ŝi petis iun subskribi anstataŭ ŝi. Poste ŝi iom hontadis, eventuale oni kredas, ke ŝi ne scias skribi, kvankam ŝi ne volis nur, ke tiuj vidu, kiom la tremado kaptis ŝiajn brakojn.*

*Gaja kaj feliĉa estis la vidvino. La forto revenis en ŝian korpon. Ŝi pensis pri la filo kaj bofilino kaj pri tio, ke vespere estos Kristnasko. Tiam ŝi donos la monon al la bofilino. Vespere ili kunestos, tiam ŝi transdonos la po cent forintojn. La gejunuloj ja pli bone scias, por kio ili volas elspezi ĝin. La donaco, kiun ŝi aĉetus, eble ne plaĉus al la bofilino.*

*Je dio, kion ŝi faru, se ŝi ne amas la bofilinon, kiu, tamen, apartenas al la filo. Sed neniu atendu ŝian morton. Ne tiom malbona estas eble la bofilino, nur ŝi volas fari ĉion alimaniere.*

*Ankaŭ en la malnovaj tempoj estis tiel, ke la junaj bofilinoj ĉion elenviis el la maljunaj gepatroj. Ŝi memoras ankoraŭ pri la iama diraĵo: „Ili donacu dum vivo kaj heredigu post morto!"*

*La bofilino eĉ povis afablumi ĉiam, kiam ŝi ricevis ion de la bopatrino. Jes, vere, sed ne eblas ĉiam doni ion. Nun ŝi ricevos ĉion. Por ke la Kristnasko pasu en feliĉo. Ne indas memori, kiom kostis, per kiom da amara penado estis perlaborata tiu eta, Kristnaska feliĉo.*

*Malsuprenirante la monton, ŝi rapidis hejmen.*

*La vidvino turnadis, pesadis la penson, kiamaniere rakonti al ili, ke la aĉetisto estas granda porko, tamen, fine, ŝi havis bonŝancon. Alvenonte hejmen, si jam senpacience atendis tion, ŝi eĉ ne eksidos, ili ne vidu, ke ŝi laciĝis. Kaj ŝi ripozos iom ne en la domo, sed ekstere, en la bestejo.*

*La kadukaj, senpovaj maljunuloj estas nur obstaklo antaŭ ĉies piedoj.*

*Fine ŝi alvenis hejmen.*

*Ŝi kredis, ke filo kaj bofilino troviĝas malsupre, en la kelo, ĉar la pordo estis fermita. Venis najbarino portanta la ŝlosilon. Ŝi transdonis ilian mesaĝon kaj rakontis, ke ŝi mem vidis, proprаokule. Venis iu en taksio, gasto ĉe proksima domo, la bofilino demandis, ĉu eblus ankaŭ ilin transporti hejmen. La gasto konsentis kunvojaĝi en la urbon, al la gepatroj de l' bofilino. Ankaŭ la filo foriris, ili revenos post la festoj, kiam cirkulos jam la aŭtobuso. La najbarino eĉ tion sciis, ke la pertaksia veturado kostis tricent forintojn.*

*Restinta sola, la vidvino foriris en la stalon, kie ŝi ŝtopnutradis la anserojn, ŝi rigardis la lokon de la anseroj kaj ekkaptis la pordon, ĉar sentis sin malforta. Longe ŝi ne kuraĝis delasi la pordon, timante svenon. Sur ŝian magran vizaĝon ruliĝis larmoj el la sekiĝintaj okuloj.*

*El la hungara: Zsuzsa Varga-Haszonits*

---

**William Auld**

# „Marjorie – energio nerva"

Iam dum la jarŝanĝiĝo 1951–52 mi, kiel redaktoro de *Esperanto en Skotlando*, ricevis poemon de nekonata, novica esperantistino. Ĝia titolo estis „Marborda ŝtono", kaj ĝi tute surprizis kaj entuziasmigis min, ĉar ne nur tute mankis al la poemo la naivaĵoj kaj malspertosignoj kutimaj ĉe novicaj aspirantoj sur la poezia kampo, sed male, ĝi estis matura kaj impona artverko. Mi baldaŭ povis pli bone kompreni tion, ĉar montriĝis, ke la aŭtorino, Marjorie Boulton, jam estis verkisto en angla lingvo kaj aperigis plurajn volumojn, inkluzive de originala poemkolekto kaj tradukvolumo el la poemoj de Jules Supervielle. D-ro Boulton estis fariĝonta tiu raraĵo: profesia nacilingva verkisto, kiu ankaŭ en Esperanto verkas. Hodiaŭ ŝi vivtenas sin grandparte per siaj aŭtoraj tantiemoj; sed intertempe ŝi fariĝis ankaŭ mondkonata kaj alte ŝatata verkisto en la internacia lingvo, kie la tantiemoj estas maloftegaj kaj neadekvataj.

Eklerninte nian lingvon kaj entuziasmiĝinte pri ĝi, Marjorie ĉeestis la 36an Britan Kongreson, kaj poste ŝi plendis:

*Mi iris al Kongreso*
*Kaj* nian lingvon *volis*
*Aŭdi, sed sen permeso*
*La anoj tro parolis*
*Anglalingve...*

Tiun seniluziiĝon (kaj certe ŝi nek estis la unua nek la lasta, kiu tiel seniluziiĝis) ŝi tamen travivis, pro la allogaj kvalitoj de la literatura lingvo kaj la esperanta idealismo.

---

La titolo estas citaĵo laŭ Rimportreto far W. Auld

Ni fariĝis korespondantoj kaj amikoj, kaj en la aŭtuno de 1953 mi sendis al ŝi rondelon, kiu komenciĝis:

*Mi vin invitas korespondi*
*rondele: ĉu l' propono logas?*

kaj per revena poŝto atingis min ŝia respondo, rondelo kiu finiĝis jene:

*Hej, skoto, kion vi konceptas*
*Kiam vi sendas al anglino*

*Duelinviton? Mi akceptas!*

Ni tiamaniere korespondadis dum ok monatoj, kaj tiu korespondo (nia „junaĝa maldiskreto") aperis libroforme en 1976 *(Rimleteroj)*. Dum tiu periodo ŝi la unuan fojon vizitis nian domon, kaj mi povis proprasperte konstati la mirindan abundon kaj ŝajnan facilon de ŝia kreopovo. Sendube ŝi mem protestus, kaj prave, ke la kredo kostas al ŝi multan penadon kaj foje larmojn; sed same sendube ŝi produktis poemon post poemo en relative mallonga tempo. Ŝi estis kvazaŭ obsedita de la verkemo. La unua frukto de tiu verkado estis la poemaro *Kontralte* (1955). Ĝin sekvis *Cent ĝojkantoj* (1957) kaj *Eroj* (1959).

La talento de d-ro Boulton havas multajn facetojn, sed unue ni iom priparolu ŝin kiel poeton. Unue ni konstatu, ke la tri poemaroj kune amplekasas (preskaŭ nekredeble) 700 paĝojn! Kaj la enhavo de tiuj paĝoj estas variega, de sonetcikloj ĝis rimportretoj kaj porokazaj verkoj. Kiaj estas ŝiaj karakterizoj? Nu, unuavice ŝia humaneco. Ĉiujn formojn de suferigo, tiraneco, krueleco kaj perfortemo ŝi abomenas kaj senkompromise kondamnas:

*... ĉi patrujo, kie*
*ĉi sama redaktor' filantropie*
*dissendis furnalistojn por riveli*
*kiel krimuloj volas murdi, ŝteli,*
*perforti kaj perfidi...*

aŭ pli subtile kaj pli trafe, pri buĉotaj ŝafoj:

*Povraj ŝafoj!*
*Vi en humilo*
*El viaj verdaj domoj*
*Iras al mort' sen epitafoj*
*Kvazaŭ vi estus homoj.*

Simile, ŝi montras kompaton kaj teneron, ekzemple en la 28 sonetoj de „Trista tenereco" dediĉitaj al la edukado de ŝiaj studentinoj (ĉar ŝi estis siatempe Direktorino de Instruista Seminario). Ŝi estas ankaŭ klarvida observanto, unuflanke de la naturo, kaj aliflanke de la detaloj de la ĉiutago:

*Oni rabotas.*
*Buklaj ligneroj pluvetas,*
*flokoj de daŭra neĝo, brile puraj,*
*rezinodoraj...*

Humuron ŝi posedas abunde, kaj ofte tio tralumas ŝiajn poemojn, sen troa farseco. Antaŭ ĉio, ŝi estas virino, molkora sed firma, emocia sed ankaŭ forte intelekta. (Kaj, kiel la tuta mondo scias, ŝi estas kat-amanto, kiel atestas ŝia prozo kaj ŝia poezio.)

Kion eble ne ĉiuj scias, ŝi ankaŭ brile tradukas poemojn. Bedaŭrinde, ĝis nun, ŝiaj poemtradukoj aperis nur en diversaj gazetoj kaj revuoj; ili traarkas interesan gamon, de Lewis Carroll ĝis Wordsworth, kaj estas mirinde belaj kaj fidelaj.

Proze ŝi verkis multajn novelojn, el kiuj nur parto estas kolektita en la volumo *Okuloj* (1967). Tie ŝia humuro povas pli senbride evidentiĝi ol en la poemoj; ŝi scias ankaŭ trafe seriozi sed ŝiaj verkoj ĉiuokaze estas leginstigaj kaj atentokaptaj. Kiu, leginte ĝin, iam forgesos la „Sekreton de la lernejestrino"? Aŭ la socikonscian fantasciencon de „Fenikso"? Pri siaj katoj ŝi eldonis ankaŭ du ĉarmajn libretojn, *Kvarpieda kamarado* (1956) kaj *Dekdu piedetoj* (1964), el kiuj la dua dankinde reeldoniĝis en 1979. Sen serioza literatura intenco, tiuj libroj estas legindaj minimume pro la vigla esprimiva lingvaĵo, per kiu ŝi verkis ilin.

Originala dramo estas iom postrestinta fako de nia literaturo, sed ankaŭ sur tiu kampo Marjorie pioniris kelkajn vojojn. Ŝia kolekto de unuaktaj dramoj *Virino ĉe la landlimo* aperis en 1959. La 15 dramoj varias inter politika seriozo (ekzemple, la titolverko), fantazio (*2060*), kaj movada komedio *(Maneken-parado)*. Du el ili estas versdramoj, en kiuj la poezio plifortigas la emocion de la temoj.

La klerulo Boulton montriĝas en ŝia biografio de L.L. Zamenhof. Anglalingva versio aperis en 1960; en 1962 eldoniĝis la esperanta versio, multege pli ampleksa ol la angla, kiu ja celis neesperantistojn. En la preskaŭ du jardekoj pasintaj depost tiam, multaj pliaj esploroj pri la iniciatinto kaj la frua movado estas faritaj kaj daŭre farataj, kun la rezulto, ke detaloj nekonitaj de d-ro Boulton ie-tie modifus hodiaŭ ŝian tekston, tamen ŝia *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* restas fidinda, simpatia kaj psiĥologie trafa studo, kiun neniu studanto volus neglekti.

Poeto, novelisto, dramverkisto, biologo: kio cetere? Multo. Mi ja diris, ke ŝi havas sennombrajn facetojn. Kiel ĵurnalisto, ekzemple, ŝi estas fidinda rilate al liverdatoj, kaj ŝia sprita, simpatia humaneco kolorigas ŝiajn artikolojn. Mi menciu la serion „Fajrujoj de Esperantujo" (en *The British Esperantist*), en kiu, pro ŝia vojaĝado en la movado, ŝi povis pentri la hejman vivon kaj intiman karakteron de tre multaj samideanoj pli aŭ malpli konataj. Kiel lingvisto ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto, kaj kontribuis valorajn studojn al diversaj revuoj: tipa ekzemplo estas „Metaforoj kaj pensasocio" en *Scienca revuo*, aŭ „Kelkaj pensoj pri la arto insulti en Esperanto" en *Norda prismo* (ambaŭ represitaj en *Impotenta krestomatio*, 1979). En *Sciencaj Studoj* (1958) aperis ŝia psiĥologia studo „La poezikreado, observita subjektive".

Kiel pedagogo ŝi estas malpli konata inter ni; bedaŭrinde ŝiaj multaj brilaj lernolibroj kaj instruiloj sur tiu kampo aperis ĉefe anglalingve (tiel, ke tamen ili helpas vivteni ŝin.) Sed ŝi estas jam de multaj jaroj direktorino de ĉiujaraj intensaj kursoj (triŝtupaj) en Barlastono, Anglujo, kaj ŝi kontribuis kelkan instrumaterialon al, ĉefe, *The British Esperantist*. Mi scias, ke aktuale ŝi kompilas esperantan legolibron, kiu certege plenigos breĉon en nia pedagogia rimedaro (kaj, se mi konas ŝin, estos avide legata ankaŭ de niaj spertuloj! )

Per kelkaj linioj neeblas sumigi ŝian kontribuon al nia kulturo internacia. Sed kiel verkisto ŝi funde lernis la plej gravan premison de la verkado: „Oni ne rajtas enuigi la leganton." Verkisto povas surpaperigi nur tion, kio en li aŭ ŝi estas. Kio estas en Marjorie, tio estas klero, ŝercemo, seriozo, belamo, sindediĉo. Kaj multe pli. Malmultaj estas tiuj, kiuj same amplekse riĉigis Esperanton.

## EL LA VERKARO DE MARJORIE BOULTON

### EL «KONTRALTE» (1955)

#### MARBORDA ŜTONO

*Mi marŝis apud la marbordo;*
*La suno estis ruĝa sfero,*
*Koagulaĵo de vespero;*
*Kaj mia koro sen akordo*
*Sangis pro mia senespero.*

*Sur roko griza kaj malmola*
*Mi staris; horizonto tedis*
*Okulojn, kaj mizer' obsedis;*
*Mi pro doloro staris sola,*
*Nenian estontecon kredis.*

*Tro kara mia karegulo*
*Devis foriri trans la maron;*
*Li fundenpuŝis songŝiparon*
*Kaj mia vivo iĝis nulo*
*Perdinte sian kor-cezaron.*

*Inter la rokoj stranga trovo*
*Altiris mian ekrigardon*
*Kaj mi rimarkis la hazardon:*
*Jen ova ŝtono, ŝtona ovo:*
*Ĉu trankviligas ĝi am-ardon?*

*Mi prenis ĝin. En mia mano*
*Bekfrapis jam la ŝtonkokido,*
*La bruo de estonta fido,*
*Espero nova, mensa sano:*
*Jen sur la maro, lunlumrido!*

### EL «EROJ» (1959)

#### AVERTO AL TIRANOJ

*Libero sangas en la strato,*
*libero en karcero krias,*
*trabrusta fulmo, vipobato –*
*libero ree konvulsias.*

*Libero mortas per malsato*
*aŭ per malvarmo malrapide;*
*libero sangas en la strato,*
*kuŝas en defluil' rigide.*

*Libero kuŝas sub la tero,*
*heroa perdo, kosta humo.*
*Printempa floro de libero*
*rebrilos per sangruĝa lumo.*

### EL «RIMLETEROJ» (1976)

#### 32.

*Ne, ne, poeta Virtuozo!*
*Ne tiom iĝu ni cinikaj;*
*Ne, Homoj stultaj, fanatikaj*
*Estas, sed Homo estas rozo*

*Pli ol sur Ter' tuberkulozo,*
*Kaj personecoj ja unikaj;*
*Ne, ne, poeta Virtuozo,*
*Ne tiom iĝu ni cinikaj!*

*Antaŭen! en heroa pozo*
*Ni staru, fuŝaj kaj tragikaj.*
*Ni ŝajnas eble lunatikaj,*
*Sed eble restos en neŭrozo*

*Ne nepo eta, Virtuozo!*

### *EL «DEKDU PIEDETOJ» (1964/1979)*

Min havas kato. Tiu ĉi ne estas gramatika eraro.

Mia kato estas aŭtokato kaj aristokato. Tiuj ĉi ne estas eraroj de ortografio.

Ne estas mirinde, ke inter miaj poemoj kelkfoje troviĝas katastrofo; ke, sen fakaj studoj pri klasifikado, mi havas profundajn sciojn pri katalogado; aŭ ke, nescia pri fiziko, mi kapablus krei, eble jam iasence kreis, katodon. Tiuj ĉi ne estas eraroj de semantiko.

Dum iom pli ol ses jaroj, tiu kato vivadis absolutisme. Tiu bela vivo ne estis laŭ la stilo de dudek-jarcenta diktatoro, inter telefonoj, aviadiloj, revolveroj, burokratoj en nigraj kostumoj. Ĝi pli similas al la vivo de iu despoto eble el biblia epoko: despotismo de bankedoj, parfumoj, kusenoj, divanoj; de luksaj kolorplenaj ceremonioj; kaj de multaj adorantaj virinoj, inter kiuj la Miaŭa Moŝto povis senti sin la sola, la unika, la nepre obeenda, la centro de la kosmo.

Vidinte kelkajn siamajn katojn kaj iom leginte pri tiu aparte bela, inteligenta kaj individueva katospeco, mi dum multaj jaroj deziris akiri siaman katon. La 18-an de februaro 1956 siama katido akiris min kiel servantinon. Tiu besto eĉ iom famiĝis en Esperantujo: ĝia portreto aperis en pluraj gazetoj; en kongresoj, tiuj, kiuj ĝentile demandis, kiel mi fartas, ofte demandis pri mia kato. Ĝi ricevis leterojn de admirantoj, salutojn, donacetojn, poemojn. La klera fripono Baupierre aludis ĝin kalumnie en *Specimene*; Raymond Schwartz sendis al mi trezoron, malnovan reklamkarton de la „Verda Kato" „por ke vi ĉiam havu *dukatojn*"; plant-patologo Paul Neergaard skribis sian unuan leteron al domaĝbesto.

Decis al tia kato aristokrata nomo: Lia Miaŭa Moŝto, Ernfrid Don Juan Tibor Reto Julio Kolomano Ferenc de Montevideo. Tiu ĉi estas nomo por formalaj okazoj. Ordinare, oni nomas la siaman despoton simple Montevideo, iom ofende al la logiko de la geografio; geamikoj rajtas nomi ĝin Monte. Kiam ĝi ŝiras fadenojn el mia sofo, kreas ŝtuparetojn en miaj ŝtrumpoj, metas brunan veluran nazeton en la kremujon aŭ lasas blankajn harojn sur nigra jupo, mi kelkfoje nomas ĝin per kelkaj aliaj neoficialaj nomoj.

Tiu kato ĝuis privilegiojn eblajn nur al absolutismo. Kiel eta katido, ĝi mordetis fingron de Ivo Lapenna. Iom pli aĝa, ĝi ŝtelis viandon el la telero de Tibor Sekelj, kiu komentis, ke eĉ kanibaloj en la brazila praarbaro ne faris tion. Dum horoj ĝi dormis apud la koro de Julio Baghy, kiun, per ia instinkta aŭ intuicia sago de besto, ĝi tuj kaj fervore ekamis.

La najbaroj en la flankstrateto kie mi loĝas en Stoke-on-Trent, ne malproksime de *Esperanto Way*, emas iomete observi mian hejmon, kie strangaĵoj okazas. La poŝtisto portas misterajn pakaĵojn kun eksterlandaj poŝtmarkoj; ekzotikaj gastoj vizitas min; mi mem subite aperas, frumatene aŭ noktomeze, ege neformale vestita, por ĉasi petolantan katon. Kiam Juan Régulo Pérez vizitis mian hejmon, li tuj identigis la dometon, ĉar siama kato atendis ĉe la fenestro de mia litĉambro, tirante flanken la kurtenon por pli bone kontroli la irojn kaj venojn en nia strateto.

Sed la plej kria sensacio en nia strateto estis dum tiu vizito de Julio Baghy, post la Universala Kongreso en Harrogate. Ni estis invititaj al festmanĝo en la urbodomo, kun granda grupo

de italaj esperantistoj. Montevideo ne estis invitita. Sed, kiam ni jam estis iom malkomfortaj en niaj elegantaj vestaĵoj, la telefono sonoris. Ĉu la italoj en sia aŭtobuso rajtos unue halti proksime al mia hejmo – por vidi, fotografi eĉ filmi la faman katon kaj respekte saluti mian patrinon? Mi ne dubis pri la taŭga konduto almenaŭ de mia patrino, kaj jesis. Mi portis la katon eksteren; mi tenis ĝin en miaj brakoj kaj per unu mano tenis ankaŭ kondukrimenon. Motorbiciklo preterpasis sur la ĉefstrato kun eksplodoj kaj muĝo; Montevideo ektimis, risorte piedbatis mian bruston, rompis la kondukrimenon kaj malaperis inter la arbustoj de iu najbara ĝardeno. La piedbato estis tiel forta kaj la tuta evento tiel fulmrapida, ke mi tute ne vidis la forkuron. Julio Baghy alvenis ĝustatempe por vidi min kun senkata rimenopeco en la mano kaj tia mieno, kian oni kelkfoje vidas sur la vizaĝo de la luno.

La kato rimarkinde mankis.

Kelkaj kurtenoj moviĝis ĉe najbaraj domoj, sed neniu folio moviĝis en najbara ĝardeno, por sugesti ke kato sin kaŝas tie.

Mi daŭre mienis kvazaŭ aŭtuna luno aŭ nederlanda fromaĝo kaj firme tenis la rimenopecon por ke ankaŭ tio ne eskapu; sed la kara veterana aktoro, kiu jam dum kelkaj tagoj studis la siaman lingvon kaj eĉ ekparolis ĝin, subite ekagis. La longaj grizaj haroj hirtiĝis en la venteto; Julio Baghy iris tien-reen tra nia strateto, gestante, grimacante, kaj eligante serion de miaŭoj adekvataj por trompi ne nur homon, sed katon. Du junulinoj hazarde alvenis sammomente.

„Miaŭ! Miaŭ! Miaŭ! "

Ili videble hezitis. La poeto volis klarigi kelkvorte al ili, ke li ne estas freneza, li vokas katon; sed bedaŭrinde li ekklarigis hungare. La junulinoj rapidis al la fino de la strato, malgraŭ la ĉarma rideto kiu estis lia dua provo klarigi; la kurtenoj pli moviĝis. „Miaŭ! Miaŭ! Miaŭ! " Sed finfine reeĥis el ĝardeno timema, mallaŭta „Miaŭ! " Julio Baghy turnis la kapon kaj la miaŭadon tiudirekten. La eĥo plilaŭtiĝis, ĝis Montevideo reaperis kaj kuris al sia fidinda amiko, samlingvano kelkajn minutojn antaŭ la alveno de la itala grupo. „Ne forgesu iam rakonti", diris la kara homo, „kiel mi remiaŭigis ĝin! "

Frigyes Karinthy | Vojaĝo al Faremido Kapilario

Tiuj ĉi du fantaziaj romanoj de F. *Karinthy*, pasia subtenanto de Esperanto, revivigas la Swiftan heroon *Gulivero*, kaj sendas lin al pluaj vojaĝoj: en la landon de la muziko kaj en submaran landon, kie regas virinoj.

**184 p. 19 cm.**
**Prezo: 13,80 ned. gld.**

LEHEL

S 150 E ***

**Produktas:**

**HŰTŐGÉPGYÁR – JÁSZBERÉNY**

# GAJA PAĜO

### Tiuj viroj...

Onidire, en certa lando la *feministoj* portas novan trikotaĵon sur la belformoj. Antaŭe legeblas: «*Virino bezonas viron...*», kaj surdorse: «*kiel fiŝo biciklon*».

### Argumentoj por niaj propagandistoj

— Fremdlingvo similas al edzinoj: oni povas vivi kun ili, sed regi...?

— Sed *Esperanto* similas al edzoj: ili estas facile studeblaj, kaj *baldaŭ firme regeblaj...*

o

### Tiel argumentu kontraŭ fumado

— Kiom aĝa vi estas, Elefantbebo? — demandas la nazegulideto.

— Nur unujara — respondas la nazegulideto.

— Strange. Mi same aĝas — maltrankviliĝas museto.

— Eble via patrino cigaredis — konsolas ĝin Elefantbebo.

o

### Novtipa krimfilmo

Nur post la ekscitega kaj sukcesinta polica enketo ekscios la spektanto: kiu estis — la detektivo...

o

### Se ne klaĉas...

— Gisela estas vere brava junulino — diras junulino al sia amikino —, pri neniu ŝi kutimas diri klaĉon.

— Certe — aprobas la alia — ĉar ŝi ĉiam parolas pri si mem.

o

### ... kaj la kontraŭo

— Terure, kiom da misaĵoj okazas sur la tero! Kiam mi estis ankoraŭ juna, oni aŭdis pri multe malpli.

— Jes, ĉar la komunikado ankoraŭ ne estis tiel perfekta!

### Argumento ĉe kuracisto

— Kial vi ne ĉesas fumi cigaredojn?

— *Mi timas,* doktoro. Laste, kiam mi ĉesis fumi, eksplodis la dua mondmilito!

o

### Kantistino prezentas

sian arton veturante en provinco. En fora urbeto antaŭ kantado ŝi rigardas inter la kurtenoj al la *malplena* salono. Furioze ŝi klarigon postulas. «Ege ni bedaŭras, sinjorino, sed... sed... verŝajne la spektantoj mankas ... unuavice ĉar neĝas...»

— Nu bone, unuavice tial. Sed kial ili mankas duavice kaj en la ceteraj vicoj?

o

### Kvazaŭ temas pri medioprotektado

— Gesinjoroj! Kial ni disputas superflue? La celo de nia konferenco estas ne la speco de la konstruota ponto, sed la decido: ĉu ĝi etendiĝu laŭlonge aŭ transverse?

o

### Paciencaj divorcemuloj

— Depost dudek jaroj ni vivas kune *nur pro tio* — koleriĝas la edzino — ĉar vi ne povas kolektaĉi tiun sumeton por la divorco!

o

### Trista soleco

— Eĉ unu veran malamikon mi ne havas...

**Tiu ĉi dukolore ilustrita libro enhavas**
**33 orel-sorĉajn porinfanajn poemojn,**
**kiuj tamen estas agrabla legaĵo por ĉiuj,**
**kiuj volonte impresiĝas de facile kompreneblaj,**
**tamen tre belaj poemoj.**
**Tradukis: K. Kalocsay kaj aliaj.**
**68 p., 19 cm.**
**Prezo: 40,— forintoj**
**(10,20 ned. gld., 2,75 rubloj)**

## Represo de majstroverko

*L. Kökény – V. Bleier: Enciklopedio de Esperanto. En unu volumo. Represo de la unua eldono de 1933/34. Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1979. 604 p. 24 cm. Bindita. Prezo: 45,– ned. gld.*

Jam de kelkaj jaroj la moderna reprodukta tekniko ebligas al ni denove disponi pri Esperantaj libroj delonge elĉerpitaj. La represado komenciĝis per malgrandaj broŝuroj, sekvis pli ampleksaj verkoj, kaj nun fine reaperis ankaŭ unu el la ne nur plej ampleksaj, sed ankaŭ plej gravaj libroj de antaŭ la Dua Mondmilito: la Enciklopedio de Esperanto (EdE).

Tiu Enciklopedio aperis en la jaroj 1933/34. Ĝi estis la rezulto de kelkjaraj antaŭlaboroj, komencitaj – en formo de 2092 alfabete ordigitaj artikoletoj – de la rusa pastro Ivan Ŝirjaev. Malfeliĉe, li ne ĝisvivis la publikigon de la verko, en kiu li aperas kiel iniciatinto-ĉefredaktoro. Ankaŭ el la triopo, kiu respondecis pri la fina enhavo, du jam mortis: Vilmos Bleier kaj Kálmán Kalocsay. Des pli ni ĝojas, ke Lajos Kökény, nun preskaŭ 84jara, kies ŝultroj portis la plej multan redaktan laboron, povas sperti, ke unuvoluma represo aperis, kiel la duvoluma originalo, en la sama Budapeŝto.

Represo de enciklopedio aperinta antaŭ pli ol 45 jaroj havas alian signifon, ol la rehavebligo de, ekzemple, beletra klasikaĵo. La ĉefa celo de EdE tiutempe estis doni al la uzantoj aktualajn informojn, utiligeblajn en la varba laboro por Esperanto. Ĉu hodiaŭ, kiam ĉia pretendo pri aktualeco pasis, ĝi ankoraŭ povas servi? Kaj se jes, kiudirekten?

Ni iom trafoliumu la 600 paĝojn. La okulon tuj frapas la granda nombro de biografiaj artikoloj. Ŝajnas, ke la redaktoroj tre larĝanime enmetis nomojn de esperantistoj, se ili minimume estis kursgvidanto en sia loko aŭ pro aliaj meritoj atingis ioman konatecon en nacia skalo. Trudiĝas la impreso, ke la movado tiutempe vere similis familian rondon, kie oni ne riskis ofendi aktivulon (kaj aĉetonton) per neenmeto de ilia nomo. La dua eldono de EdE ne povas esti simile larĝanima, se ĝi ne dekomence havas la – nerealisman – intencon plenigi plurajn volumojn. (Ke la represintoj rezignis pri la portretoj kaj aliaj fotoj, estas perdo, kiun ni eltenas.)

Manko de forta redaktora mano sentiĝas ankaŭ en la artikoloj pri landaj movadoj, kie – laŭ la antaŭparola klarigo – oni preferis lasi kontribuaĵojn neŝanĝitaj, eĉ se rezulte movadoj de komparebla graveco ricevas malegale ampleksan pritrakton. Ekzemple, al la brita movado estas donita malpli da spaco, ol al la germana kaj franca, dum pri la japana movado necesas diri, ke la artikolo estas simple pufiĝinta. Entute, por la plej multaj prilandaj artikoloj validas, ke ili estas plenŝtopitaj per nomoj, nombroj, faktoj kaj apenaŭ klopodas komprenigi al la leganto la politik-socian fonon, la sociologian konsiston de la esperantistoj aŭ la ĉefajn evolutendencojn de la movado. Sed kiu kuraĝus tion riproĉi, kiam analizaj esploroj pri la Esperanto-movado eĉ nun ne estas multe progresintaj?

Kurioza estas kelkfoje la alfabeta ordigo, precipe de la – fakte utilaj – prezentoj de unuopaj Esperantaj libroj. Priskribon de „La Tragedio de l' Homo" oni vane serĉas sub T. Ĝi troviĝas sub L, ĉar ĉiu verko aperas sub la unua litero de sia titolo, eĉ se tiu komenciĝas per la bagatela „La". Nin iomete amuzas, kiom da spaco estas dediĉita al la Esperanta folkloro: vidu la longajn artikolojn de Edward Wiesenfeld pri la Himno Esperantista, insigno, stratoj kaj monumentoj kaj pri poŝtstampoj. Dume, la multe pli gravaj temoj de interna ideo kaj homaranismo estas tute nesufiĉe traktitaj. Mankas ankaŭ artikolo, kiu resumus la kontribuon de judaj esperantistoj al la movado.

Sed sufiĉu la kritiko. Finfine, la redaktoroj mem bone konsciis, ke ilia verkego estas mankohava. Pli bone, ke ni donu ekzemplojn de la fortoj, kiuj multe superpezas la mankojn kaj neeviteblajn diletantaĵojn. Troviĝas en EdE bonaj koncizaj superrigardoj pri la literaturo, de Alec Venture, pri la vivo kaj verkaro de Zamenhof de Gaston Waringhien, pri la pasivaj participoj de Kalocsay, apud multaj aliaj artikoloj, kiujn legi ankoraŭ nun estas profite. Ni laŭde menciu, ke la „nigra ŝafo" Louis de Beaufront estas tute senemocie priskribita. Ni ricevas ankaŭ bonan komprenon pri tiutempaj (kaj nunaj) disputoj, kiam en la artikoloj pri io-ujo-batalo, vortkunmeto kaj vortordo, verkitaj de Kalocsay, aldoniĝas noto, en kiu la pedantema Montagu Butler esprimas sian malkonsenton („La uzo de -io fariĝis kvazaŭ politika dialekto en E"). Kaj sub „Hispanujo" estas aparta, tre interesa priskribo de la kataluna movado, kiu ne prisilentas, ke la katalunaj esperantistoj suferis persekutojn pro „separatista agado kontraŭ la hispana ŝtato". En la artikolo „Laborista movado" estas prezentita la starpunkto de SAT, dum sub „Proleta esperantistaro" ni trovas tiun de ĝiaj komunismaj kontraŭuloj. La krizon en la neŭtrala movado traktas en la artikolo „Organizo" J. R. G. Isbrücker, kiun tuj sekvas kontraŭdiraj rimarkoj de C. C. Goldsmith.

Tiuj ekzemploj ilustras la strebon de la redaktoroj al objektiveco. Ni ne forgesu, ke la Enciklopedio aperis en tempo, kiam ne nur UEA kaj SAT estis rigore apartigitaj, sed ankaŭ interbatalis „laboristaj" kaj „proletaj" esperantistoj kaj same UEA travivis profundan krizon, kiam la germana asocio klopodis spiti – per iluzia sinadapto – al la naziismo kaj kiam en Soveta Unio jam anonciĝis la periodo de personkulto. Konsidere al tiu historia fono, la Enciklopedio estas majstroverko: ne nur ĉar oni entute sukcesis kunigi tiom da laborfortoj por ĝia kompilo, atingante, ke – laŭ la antaŭparolo – EdE iĝis „la sola verko pri kiu kunlaboris anoj de ĉiuj tendencoj en nia movado", sed ankaŭ ĉar – kiel substrekas Vilmos Benczik en sia postparolo al la represo – ne estis faritaj kompromitaj cedoj al malamikaj regantoj. Li atentigas, ke la Enciklopedio, aperinta en la duonfaŝisma Hungario, estas „nepre *honesta* verko".

Jen kio do konsistigas la daŭrantan valoron de la represita Enciklopedio: ni estas per ĝi rememorigitaj al la tradicioj de la Esperanto-movado kaj, pli specife, al la virtoj de la tiutempaj laborantoj – energio, prudento kaj kuraĝo. Ilin ni bezonos ankaŭ estonte.

Ulrich *Lins*

## DU PROVERBOJ

Du Zamenhofaj proverboj troviĝas en la ĉefaj linioj (H.1., V.1.) de nia enigmo. Kiel solvon sendu al ni tiujn du proverbojn. Limdato: unu monato post alveno de la revuo. Inter solvintoj ni lotumos premiojn.

**Horizontale**: 15. Kaŭzanta malplezuron pro senintereso. 16. Monavida, tro ŝparema. 17. Plej malgranda ero de materio (R). 18. Ne kurbiĝanta. 19. Kvarpieda, longorela ŝarĝbesto. 20. Disponebla kvanto da varoj. 21. En diversaj direktoj. 22. Rivero en Jugoslavio. 23. Faros specialan signon sur io. 24. Naskito, filo. 25. Peco de tuko, uzata por kovri virinan vizaĝon. 26. Kontinua streko, montranta difinitan direkton. 28. Malesto aŭ nesufiĉo de io bezonata. 29. San... havenurbo en Kalifornio. 30. KN. 31. Movebla mola karnpeco en la buŝo (R). 32. Dudek...: estanta en aĝo de dudek jaroj. 34. Grekortodoksa pastro (R). 35. Akiris sciojn kaj lertecon. 38. Dombesto. 39. Staras post la naŭcentnaŭdeknaŭa. 40. Fera hakfosilo kun pinta kaj plata ekstremoj (kun adjektiva finaĵo). 41. PA. 43. TO. 44. Sendi iun kiel reprezentanton (R). 45. Literoj de reno, miksate. 46. Interjekcio de aklamo. 48. Adepto de novaj tendencoj koncerne religion, lingvon ktp. 50. Finaĵo de V.60. 51. Blankligna arbo kun flekseblaj branĉoj. 53. Ringoforma koralinsulo. (R). 54. PT. 55. Pikantan insekton. 56. RP. 58. Sufikso por esprimi frakciajn numeralojn. 59. Artikolo. 60. Estigas ion, plenumas agon. 61. Komercaj negoceblaj valorpaperoj 63. Konjunkcio. 64. Karnan apendicon, pendantan ĉe rando de velo. 66. Vianda manĝo. 67. ...metiko. 68. Fadenforma organika teksaĵo. 69. Ofta virina nomo. 70. Komenci batalon. 71. Sekvas post la dua. 72. Malriĉa dometo (R). 73. Vorto, anstataŭanta subkomprenitan substantivon.

**Vertikale**: 2. Epopeo de Vergilio, esperantigis ĝin H. Vallienne. 3. Nomo de diversaj ŝelohavaj, oleecaj fruktoj. 4. ...lo: rondforma varo por ĉerpi aŭ teni fluaĵon. 5. Reen: faro. 6. Adverbo por plifortigi aserton. 7. Iloj por fortranĉi barbon. 8. Vegetaĵo uzata por nutri ĉevalojn. 9. Havanta nenian korpan direkton. 10. Pli ol sufiĉe (adverbo). 11. RA. 12. Alkala blanka metalo, kun kloro donas salon. 13. Kiel 20. H. 14. Difinita parto da spaco. 19. Rizbrando (R). 20. Ruĝa fluaĵo fluanta de koro. 22. Akcepti iun kiel pagitan laboriston. 23. Ellaborata far abeloj. 25. Ne valorantan atenton. 26. Malnovan kordmuzikilon. 28. Surtera restaĵo post pluvo. 29. Metalfadeno (R). 30. Kunlaboranto,



samprofesiano (R). 34. Afrika sovaĝbesto. 33. AK. 34. Medikamento en firma formo (R). 36. Grajnoforma kombinaĵo de sulfuro kaj metalo (R). 37. Amase elĵetos ion tra buŝo. 39. Granda sukplena frukto (R). 42. Reen: ne plia ol, ne alia ok.. 44. Havaĵoj, kutime havigataj okaze de geedziĝo. 46. Lumplenan. 47. Prepozicio. 49. EA. 51. Oficejo, kontoro. 52. Deveno. 55. Senhararan. 57. Alia, sekvanta daŭre. 59. Profanulon, senkompetentulon. 60. Venĝema, kolerema persono. 61. Provizora ligna konstruo (R). 62. Identaj vokaloj. 63. Aparato por ebligi fluadon. 65. Koloro (R). 66. Perforte forpreni ion. 67. Kiel 17.H. 69. Elstara parto de brusto (R). 70. Homo, devenanta el antikva tribo (R). 72. KA. 73. PA.

## * Ekzameno sen risko *

**Ekzamenanto: Georgi Mihalkov**

### ĈIELA BIRDO
**Zsigmond Móricz**

La multfaceta verkado de la hungara verkisto Zsigmond Móricz jam estas vaste konata ekster Hungario.

1. Kiam estis verkita la novelo „Ĉiela birdo"?
2. Kiel nomiĝas la edzo de Panni?
3. Kiu el la figuroj de la novelo eldiras la sekvan frazon:
   „ -- Mia eta Panni... mia eta birdo... mia eta ĉiela birdo..."

*La limdato por la respondoj estas unu monato post la apero de la revuo.*

### INTERNACIA ESPERANTISTA LABORBRIGADO EN HUNGARIO

Trian fojon okazos ĉijare la Centra Internacia Esperantista Laborbrigado (CIEL) en Hungario. Ĉijare ĝin akceptos la agrikultura kooperativo „Ferenc Erdei" en la ĉe-Danuba vilaĝo HARTA (proksime al la urbo Kalocsa). La laboro estos akvumado de la agro, pli precize, manipulado de tiucela tubosistemo. Ĉar la maksimuma pezo, kiun oni devos levi, estas nur 5 kilogramoj, estas atendataj ankaŭ junulinoj, laŭeble pli ol 18-jaraj. Taga labortempo estos 7 horoj.

Unu laboretapo estos 2 semajnoj, kiun sekvos 1-semajna ripozo (antaŭvideble apud Balatono).

Laboretapoj komenciĝos: 06–28, 07–12, 07–26, 08–09. Aliĝdato estas: la **1-a de junio 1981**. Aliĝojn oni sendu al **Hungara Esperanto-Junularo, Budapest, Pf. 193. H-1368.**

# Leterkesto

*Vladimir Petelĉie,* SU-Ukraino, *Nikolajev; Virginia Ivanova,* SU, *Irkutsk,* kaj aliaj: Viaj solvoj pri la novelo „La mistera fraŭlino" bedaŭrinde tro malfrue alvenis, kiam la redakta komitato jam decidis el inter la pli frue, ĝustatempe alvenintaj „daŭrigoj". Viaj solvoj estas same gratulindaj – kaj venonte ni atendas ilin konkursi pli frue por eventuale publikigi kiel venkantan.

*Wilfried Hofmann,* GDR, *Karl-Marx-Stadt:* Via ampleksa letero kun seriozaj rimarkoj estis akceptata de ni memkritike. Bedaŭrinde ne malofte glitas tra niaj manoj neologismoj, sekve ili restas senglose. Sed eĉ pli forte ĉagrenas nin enŝteliĝintaj ne-Esperantaj vortoj, tiuj evidentaj eraroj, kaŭzitaj pro konoj pri pluraj lingvoj. Do: intermiksoj enmensaj, precipe se tiuj vortoj laŭforme ŝajnigas sin „ruze" E-aj vortoj! Malgraŭ nia luktado kontraŭ tiuj en la manuskriptoj, malgraŭ multaj ruĝkrajonadoj, restas kelkaj tiaj pekoj. Feliĉe, kiel vi elmontris, nur kelkaj! Ni devas do pli atenti – petante tamen indulgon de la legantaro. – Konsentite koncerne vian kritikon pri ofte troa fakeco de la artikoloj pri akvomastrumado. Kaj vi observis jam, ke tio dume iĝis pli popularscienca, pli ĝueblaj la artikoloj, kompreneble ne sen interveno de la redakcio. Ni atendas viajn seriozajn vortojn ankaŭ venonte – nun akceptu la dankon. *Gemuta*: plaĉe humura (evitenda).

# Korespondi deziras

Inĝeniero (30) pri komunaj temoj, Sergej *Kocarj*, SU–350 000 *Krasnodar* ab. ja. 18. –– Teksistino (23) pri literaturo, moderna muziko, turismo, rec. veturo, interŝ. bk, modrevuojn. Jolanta *Turlej* PL–31-810 *Kraków* 39, str. Strusia 18/4. –– Pianisto, studento de konservatorio (20) kun profesiaj gemuzikistoj, Vydas *Stradomskis,* SU–Litovio, 232038 *Vilnius* a/d 718. –– *Kovnators* Naumo (23) kursgvidanto ktm, pĉt, kol. bk, pm, E-glumark, precipe kun la suda hemisfero. SU–Latvio 228400 *Daugavpils* 17, pk. 455. –– E-rondeto de Fizika Fakultato de Universitato, tutmonde kun gestudentoj kaj instruistoj, precipe fizikistoj. Oleg *Ignatjev* SU–340092 *Doneck* ul. Niĵnekurgankaja 41, kv. 93. –– E-rondeto La Pordego de la Maro (gejunuloj 16–20) kun junuloj, certe respondos. Adreso: Gunars *Jankovkis,* SU–Latvio 229910 *Ventspils*, Stacijas str. 8–1. –– Sergej *Saŝmin* (17) pri lingvoj, tekniko, radio, politiko kc, kol. pk, bk, pm, insignojn, sendas ankaŭ bildojn de Uralo. SU-454112 *Ĉelabinsk,* Prosp. Pobedu 306, kv. 104. –– *Kocarj* Irina (16) lernantino pĉt, kol. bk, pm. SU–350049 *Krasnodar* str. Gagarina 145, kv. 11. –– *Petrovski* Vieslavo (17) lernanto en teknikumo, kun junulinoj pĉt. PL–15606 *Bialistok* Skrybiĉe 23. –– E-Klubo de Tomsk serĉas korespondanton por membroj – la komuna adreso: *Tomsk,* ab.k. 261. SU–634041. –– Aleksandr Z. *Ŝlafer* (24) matematikisto, E-instruisto, pri matematiko, lingvoj, E-logio, ĵazmuziko, interŝ. librojn, bk, pm. –– Tanja *Kokoreva* (20) studentino, pri muziko, sporto, E-kantoj, interŝ. bk, pm. –– Nadeĵda M. *Birjulina* (23) pri lingvistiko, arto, ĵazmuziko, dancoj. –– Anatolo *Gulidov* (22) pri seriozaj temoj, interŝ. bk, foto, gazeto. –– Ljudmila *Vikulina* (21) pri E-kantoj, bk, pm, libroj. –– Irina *Ŝlafer* (22) studentino pri literaturo, muziko, kemio. –– Boris *Kacnelson* (24) pĉt, interŝ. bk, fotojn. –– *Vajda* Ioan (30) programisto pri turismo, interŝ. filatele bk, pm, R–2200 *Braŝov–1,* cas. poŝt. 91.

*Douglas Kelly,* GB, *Manchester*: Ni konsentas pri ega graveco de la medioprotektado, ankaŭ pri viaj rimarkoj koncerne la zorgadon de la ŝtataj instancoj pri tiu agadsfero. Rilate nian tiuteman artikolserion, respektive viajn kritikojn, legu la supran respondon.

*Leon Zimels,* SU, *Ternopol:* La iama granda renomo de Lejzerowicz kiel eminenta tradukinto de „Dibuko", depost la dudekaj jaroj bedaŭrinde jam plejparte forgesiĝis. Eĉ inter literatur-fakuloj apenaŭ troviĝas, kredu al ni, kiuj konas tiun bonegan tradukaĵon (kaj verkon). Tio klarigas, kial oni ne kutimas mencii apud lia „Verda Biblio" la jam eksan sukceson de „Dibuko". Al lia literatura graveco tiu majstra satiro ĝislonge ŝajnas sufiĉa! Dankon akceptu pro la amika letero.

*Oskar Stolberg,* GDR, *Brandis*: Plezure por ni estas, se niaj recenzoj trovas plaĉon en si mem, kaj post legado de la koncernaj verkoj ankaŭ plejparte konsenton. Eble subtenas tion, ke nia redakcio konsideras altan gravecon de la orientigaj recenzoj, kaj „ĉirkaŭdisputas" ofte tiujn por atingi nepre respekteblajn kaj objektivajn libro-prezentojn. Pri sciencaj tekstoj, postulantaj por si lokon en krestomatio, principe vi pravas; tamen ne forgesu, ke en ĝi temas pri prezentindaj aŭtoroj de nia literaturhistorio kaj ne (aŭ malpli) pri artspecoj aŭ stiloj.

*Sergeo V. Kocarj,* SU, *Krasnodar*, Pk. 18: Kiel prezidanto de la urbaj E-organizaĵoj informas la redakcion pri vere grandiozaj propagandaj sukcesoj: 10 kursoj en gravaj institucioj kun 200 komencantoj, 2 grandaj ekspozicioj, koncertoj, prelegoj, 400 invitaj afiŝoj! Brava fervoro, juneca entuziasmo kaj serioza laboro subtenis tiujn (dum nur dumonata kampanjo! ) – kaj preter ili havi E-on, kiel devigan studobjekton en la Universitato... Probable multaj interesiĝos ĉe vi pri la „ŝlosiloj" de tiuj elstaraj rezultoj.

*Timofej D. Ŝuvajev,* SU, *Niĵne-vartovsk*: De la Siberia riverego Irtis venis via raporto pri grandsukcesa ekspozicio kadre de „Amikeco trans limoj". Kvankam ĉ. 3 mil kilometroj apartigas vian urbon de la supre menciita Krasnodar, de la Azova Maro, via agado por firmigi la internacian sentojn per korespondado kun 20 landoj iras en la sama direkto. Ni opinias tre grava la kunlaboron kun aliaj kulturaj kaj movadaj organizaĵoj kaj iliajn akiritajn simpation, eĉ rekonon – krom la cento de la lerni komencintaj. Tiel, tiel plu!

*Norman A. Collin,* Aŭstralio, *Buderim*: Por konfesi honeste, ni kelkfoje iomete dubas, ĉu la skiza historio de la malgranda Hungario – ie meze de la duoninsulo nomata Eŭropo – povas interesigi loĝantojn (abonantojn! ) en aliaj kontinentoj. Via amika letero estas jesa respondo je niaj problemadoj; ankaŭ je la dilemo, ĉu foje ni publikigu pri aktualaj aferoj de ekonomio, k.s. Laŭ via kaj laŭ similaj leteroj eblas plej ĝuste orienti nian redakcion, havi fadenojn al nia vasta, multlanda legantaro. Manpremon!

**HUNGARA VIVO** + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Respondeca redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** + **Redakta komitato: Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Ġeorgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141–078, 334–194. + Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H. I. 215–96–162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,– al eksterlando por unu jaro 90,– Forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H–1389. Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 7,– Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. – Fejér megyei Nyomdaipari Vállalat, Székesfehérvár. Respondeca gvidanto: Pál Gyenti, direktoro. + **Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704**

# BONAJO
# EL HUNGARIO

HUNGAVIS

# ETERNE MODA, ETERNE VALORA ESTAS LA GOBLENO

25 JUL 1981

Hungarocoop Budapest